

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 25 FF

Giri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :

Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut

\*\*\*\*\*

**Valo :**

## MEMORE PRI LANTI

Mi ĵus finis la legadon de dikega pako da maldikaj folioj, tajpokopioj de skriboj de LANTI. Tiun pakon sendis al mi Kdo DAZUN kiel materialon por studo pri la stilo de LANTI. Nu, tiu stilo estas admirinda : konciza, lerta, eleganta, originala. Sed eĉ pli admirinda estas lia penso : klara, rekta, ne flankiĝanta, ĉiam trafa al la esenco de la aferoj. La rezonado estas rigora kiel geometria demonstrado. Mirinde ĝusta estis lia intima sento pri la strukturo de nia lingvo, dank'al kiu li ĉiam elektis la vorton, esprimon aŭ frazoturnon plej simplan kaj plej adekvatan por precize esprimi sian person. Li rifuzis riverenci al la tradicio kreita de la "bonaj aŭtoroj", sed kritike rilatis al ĝi, ĉar tiuj aŭtoroj, inkluzive Zamenhof mem, estis, kiel ni ĉiuj, pli-malpli influataj de nacilingvaj kutimoj. Reage LANTI strebadis uzi lingvon kiel eble plej pure logikan. De li tiurilate ni povas multon lerni.

Fine, mirinda estis lia kapablo por komisii al si mem kaj al

aliaj multajn urgajn kaj precizajn taskojn. Tion bone sciis liaj plej proksimaj kunlaborantoj, kaj tio evidentiĝis el multaj el liaj leteroj.

Batalanto, organizanto, animanto, tia estis LANTI ĝis en la lastaj tagoj de sia vivo. Tiu vivo, en sia lasta kvaronjarcento, 1921-1947, estis ekzempla kiel lia verkaro. LANTI, modela kiel esperanta verkisto, estis ankaŭ modelo kiel esperantisto.

Pasis 37 jaroj. Mortis LANTI. Sed lia penso restas viva, daŭre aktuala. Kun ĉiama profito ni povas relegi liajn verkojn : eĉ se ni ne ĉiam samopinios kiel li, ni trovos en tiu legado temojn por utila meditado.

### Baldaŭ tria volumo el "VERKOJ DE E. LANTI"

Atingis la sidejon de SAT-broŝurservo, donacite de Kdo DAZUN, la kopioj de skriboj de LANTI, pri kiuj ĉi-supre aludas Kdo VALO. Ĉar jam aperis ĉe la B.S. du volumoj el "Verkoj de E. Lanti", kiuj enhavas multajn ne tre konatajn tekstojn, kaj estis reeldonita (parte fuŝe, pardonu!) la "Vortoj", mi esploris ĉefe la dokumentojn rilatajn al la lastaj jaroj (1937/1946). Dum tiu periodo plene maturiĝis ne nur la stilo de LANTI, sed ankaŭ lia rigardo al la mondo, kiun tiam disŝiras la mondmilito.

Tiu homo, kiu tiam suferegas korpe ĝis neelteneblo, kaj konscias kiom malproksima estas la celo, kiun li iam, en 1921, fiksas al la laboristaro esperantista, tamen konservas viglasian klarvidon kaj sian humuron, kiun cetere li ofte aplikas al si mem. Eĉ pli ol iam ajn li aspektas for de ĉia dogmismo, de ĉia pensrigidiĝo. Jes, ĝis la fino - kiun li mem decidis - li restis la herezulo, kiu senĉese surprizas, foje ŝokas, plej ofte dubigas, sed kiu ĉiam stimulas ĉies "cerbajn sekreciojn".

Estas en tiu arkivaro sufiĉe da interesaj tekstoj, neniam reeldonitaj artikoloj kaj leteroj, por konsistigi trian volumon el "Verkoj de Lanti". Tiun la broŝurservo projektas do eldoni kiel eble plej frue por iom pli bone prilumi la lastajn, relative malbone konatajn, jarojn de LANTI.

Dume, mi elektos por "Laŭte!" kelkajn aliajn, neortodoksajn, diskutvekajn vidpunktojn, ĉerpitajn el diversaj leteroj de la sama periodo.

Jes ja, devus esti ree disponeblaj ankaŭ la verkoj "Naciismo" kaj "Leteroj", sed ni paciencu : ne ĉio samtempe, ĉu ne ?

Kribo

la venonta "Laŭte!" aperos fine de aprilo

## LAŬTAJ PETOJ KAJ INFORMOJ

### Ĉe la mediteranea marbordo

La "Cercle Biterrois d' Espéranto" organizas lingvostaĝon de la 16a ĝis la 19a de Majo 1985. Ĝi okazos en "Les Sablières", malnova langvedoka bieno de la lasta jarcento. Ĝi konsistas el 2 domoj apartigitaj de interna korto, meze de arboj. Situate apud la enfluejo de Aude, je 15 km de Béziers, 5 km de Valras, "Sablières" prezentigas kiel taŭga laborejo. Ĉiuj povos manĝi k dormi surloke (3-4-6 litoj en ĉiu ĉambro). Tri kursoj okazos, inter ili unu por veraj komencantoj. Ekzamenoj por kiuj deziros. Ni esperas vian partoprenon.

Informoj : C.B.E., 9 rue G. Picot, 34500 BEZIERS

Tel.(67) 31 13 18. Prezo : 360 FF por la tuta restado (loĝado kaj 3 manĝoj) pli-malpli 10 % laŭ la nombro de partoprenantoj. Aliĝkotizo : 20 FF.

### "Mi bezonas amikojn..."

"Amikoj, mi nomiĝas Guillermo Juan. Mi estas juna pentristo kaj verkisto. Mi havas 30 jarojn. Mi laboras ĉi tie en Güira de Melena, suda vilaĝo, sed mi loĝas en Havano. Mi estas fraŭlo, Arkpafanto. Mi ŝatas multe mian laboron (pentrarta profesoro por infanoj) kaj mi deziras korespondi kun junuloj el Francujo. Prefere, kun gepentristoj kaj geverkistoj, aŭ aliaj junuloj, pri jenaj temoj : pentrarto, ceramiko, artgrafiko, fotografio, poezio, ktp. Krome, mi bezonas amikojn. Mi bezonas certajn kaj fidelajn amikojn. Por interŝanĝi ideojn pri la nuna mondo, por fari pli bone nian vivon. Ĉar eĉ ĉi tie estas ebla la soleco, kaj mi volas fidi ankoraŭ la amikecon.

Se vi povus, bonvolu, helpu min. Mi estas atendanta vian respondon. Mi ricevos ĝin gaje. Dankon. Ĝis revido.

Guillermo Juan, Poŝtkesto 57, Güira de Melena, Havano/CUBA

### Piedirado tra Verkor-montaro

De la 5a ĝis la 13a de julio, unuafoje okazos internacia renkonto kaj piedirado tra la Regiona Natura Parko "VERCORS". La ekskurso daŭros sep etapojn, de kampadejo al kampadejo. Oni dormos en tendo, kaj ĝuos la pejzaĝon de la plej bela mezalta montaro el Francio. Inf.: "NOVA STELO", 20 rue des Jardins, 26500 BOURG-LÈS VALENCE. Francio.

### Esperanto-Piedmigrado tra Lozer-montaro

De la 1a ĝis la 6a de julio 1985 en la Eŭropa Vilaĝo Le Pouget (Lozère), je 2 km de Villefort, fervoja linio Paris/Nîmes, en la kadro la "CHEMINS"-Asocio.

Ekde aŭtentika vilaĝo el granito ni piedmigrados stelvoje tra la Lozer-montaro, laŭirante la Rigordone, ktp. Tiu piedmigrado sin turnas al esperantistoj kaj neesperantistoj. Por la neesperantistoj, okaze de tiuj plezuraj marŝadoj, ni inicos pri Esperanto. La Eŭropa Vilaĝo LE POUGET (asocio laŭ leĝo de 1901) estis kreita en 1965. Ĝia celo : organizi internaciajn renkontiĝojn okaze de propraj laborejoj por gejunuloj (konforma renovigo de la vilaĝo Le Pouget). Tiu vilaĝeto konsistas el malnovaj farmdomoj kun platŝtonaj tegmentoj, ĝi situas ĉe la limo de Lozère, Gard kaj Ardèche, meze de la nacia parko de Cevenoj.

Krom la laborejoj, okazas aliaj aktivadoj : restadoj kun temoj seminarioj, lernejoj vojaĝoj, klasoj pri naturstudado, medio, metiistaj staĝoj, ktp. Por pli da informoj, skribu al :  
Ginette GABILLON, 32 rue Renault, 33200 Bordeaux  
Caudéran, Francio.

Jara pikniko de la Vaŭkluzo Federacio : la 19an de majo '85 en Vaïson-la-Romaine.

Dua Rodano E-Rendevuo de L.F. Koop. : en Avignon, la 19an kaj 20an de oktobro 1985.

Informas : GENTE, 9 av. des Erables, 84000 AVIGNON.

### Perpignan : D-ro Albault prelegis

En sia jara ciklo la Politeknika Asocio invitis D-ron Albault la 20an de januaro. Matene, S-ro Lech-Walter akceptis lin ĉe la Esperantista Kulturcentro, kaj kun geesperantistoj kaj eĉ neesperantistoj, amika tagmanĝo okazis en kataluna restoracio. Je la kvina, ĉe Palaco de la Kongresoj, S-ro Albault prelegis pri "La lingva diverseco kaj ĝiaj solvoj".

### Aĝenia Esperanto-Rondo funebras

Fine de februaro forpasis nia amiko Henriko Benaïm, prezidento de nia grupo. Fervora kaj sindonema al ĉiuj altidealaj celoj (pedagogio, sindikatismo, esperanto...), li gvidis dum pluraj jaroj E-kurson en Aĝeno kaj animis en Kastelo Grezjono. Ni ankaŭ ne forgesas, ke ĉefe dank'al lia helpo povis okazi en Aĝeno la SAT-Amikara kongreso, 1974.

### En RENNES : Staĝoj pri informadiko kaj esperanto

Inter la membroj de la Renna E-Klubo troviĝas 6 aŭ 7 inĝinieroj aŭ instruistoj pri informadiko. Tial ni organizas semajnfinojn pri Informadiko kaj Esperanto : 9-10 februaro, 20-21 aprilo, 27-28 aprilo 1985. Ni jam spertiĝis per tri similaj semajnfinoj en 1984. Kursoj daŭrantaj unu horon kaj duonon sin sekvas alternigante informadikon kaj E-on, t.e. preskaŭ 6 horoj por ĉiu temo en unu semajnfino ekde la 14a sabate ĝis la 17a dimanĉe. Unu gvidanto por maks. 6 staĝanoj kaj unu mikrokomputilo por maks. 3 staĝanoj en informadiko.

Ni jam pripensis la organizadon de staĝoj nur pri informadiko, sed nur cele al realigo de programoj utilaj por Esp-o, iuj staĝanoj jam komencis labori pri tio. Estas bonvenaj viaj komentoj, informojn kaj enskribiĝojn al : Christian BERTIN, 60 allée de la Renaudière, 35510 CESSON SEVIGNÉ. Tel (99)62.90.88

### ĈE S.A.T.- BROŜURSERVO :

La nova eldono de "Initiation à l'Esperanto" de An Kaŭ estas disponebla. 44 p. + pli dika frontpaĝo : 5 FF (Mendkodo : IE). Al ĝenovuloj ni senvaligu la nomon de la verkinto : André CAUBEL, iama redaktoro de "SAT-Amikaro" kaj iama membro de F.E.I., kaj certe unu el la plej talentaj oratoroj en S.A.T. La nova eldono estas stencilita (kio ebligas facile reeldoni), sed tajpita per "Julia". La aspekto estas do pli alloga. En la teksto mem, kompreneble, neniu ŝanĝo, krom la dato kaj pli ĝusta francigo de la nomo S.A.T. al "Association A-nationale Mondiale" (do ne "A-nationaliste", kio signifus, ke ĉiuj SAT-anoj estus membroj de la Sennaciista frakcio !...). Ĉar bone disvendiĝis la 1250 ekzempleroj de la antaŭaj eldonoj, la B.S. optimisme atendas mendojn por la nova (20% da rabato ekde 15-ekzemplera mendo).

### Nova poŝtkarto en Esperanto

Renna E-Klubo ĵus eldonis novan simplan koloran poŝtkarton. Temo : "Monto Sankta Mikaelo", kun teksto en la franca kaj en Esperanto. Ekzistas ankaŭ duoblaj koloraj kartoj kun tekstoj en la franca, bretona kaj Esperanto : "revoj kaj mevoj", "riverfluo", "brunalgisto", "muelejo", "katidoj". Rabatitaj prezoj por opaj mendoj. Renna Esperanto-Klubo, 9 square de Provence, 35000 Rennes (Villejean).

## La Ĝirondia E-Grupo kunvenis en EYSINES, 9.2.85.

La ĝirondia grupanaro partoprenis sufiĉe multnombre...kaj prave!! La menuo de tiu februara kunveno estis tamen alloga! Vidu... Unue, nia k-dino Rose Campagne, tre vojaĝema, regalis nin per diapozitivoj pri Nepalo. Ŝi montris al ni belajn pejzaĝojn el Himalajo kaj ni sekvis ŝin sur la pado ĝis 5000 metroj alte. Tre interesaj estis la klarigoj de nia prelegantino. Dankon al Rose!

Post kelkaj minutoj ekstere, ĉiuj sidis ĉirkaŭ la centra tablo kaj komencis la duan parton de la kunveno. Joël legis poŝtkarton novjaran de nia E-soldato Marcel Redoulez, kiu militservas en Germanio...kaj aliajn korespondaĵojn. Pri propagando ni sufiĉe parolis. Leo kaj Gaïta intencis vojaĝi al Périgueux por helpi Kdon Grégoire, kiu starigis tie E-grupon. Michel Lavergne proponis alvoki la ĵurnalon "Sud-Ouest" kaj respondi intervjuon en kadro de taga rubriko: "Kvar demandoj al iu Prezidanto". Kaj fine, Joël legis provleteron sendotan al S-ro Jacques Delors, prezidanto de la Eŭropaj Komunumaroj, pro tio ke tiu homo montris sian firman intencion labori por fari Eŭropon tiamaniere ke, en 1992, ne plu estu landlimoj en Okcidenta Eŭropo.

La grupo aprobis tiun proponon. Sed estus bone, ke multaj E-istoj, grupe aŭ ne, sendu leteron (legu modelon)\* el ĉiuj partoj de Francio kaj de Eŭropo.

Post tiu laborplena momento ni soifis. Dank'al nia kdino Simone Bernard ni manĝis kuketojn kaj tintigis la glasojn. Agrable... kun vino! Agrabla kunveno! Ĉu ne?

### La venontaj grupkunvenoj okazos:

\* en marto: mardon la 19an en CENON-Palmer, 18h30

\* en aprilo: sabaton la 20an en CENON-Palmer, 14h30 (diapozitivoj)

(\*) Por ricevi letermodelon, skribu al "Laŭte!", aldonante poŝtmarkon por la respondo. Dankon!


### Nia regiona "akvitanio" renkontiĝo en majo:

Ĝi okazos ĉe PÉRIGUEUX. Informoj aperos en la venonta L!

### Aĝenia E-Rondo kunvenos en majo. Informoj en la maja L!


Tagordo: nova responsularo, ebleco denove regule kunveni, varbado?, decido deponi monon en ŝparkason, kaj aliaj temoj, laŭ ĉies proponoj.

Daŭrigo de nia debato  
pri



# homoj

## kaj aŭtoj



### GAROLO:

*Homoj sen aŭtoj en la nuntempo estas kiel homoj sen Biblio... aŭ Korano, t.e. homoj perditaj en mondo, kiun ili ne komprenas! Ĉu troigo? Tute ne, Kribo kaj kelkaj pliaj esceptaj individuistoj pravigas la regulon same pri la aŭtoj kiel pri la Biblio.*

*Jen, mi, ekzemple, unuafoje stiris aŭton, kiam mi estis 28-jaraĝa, kaj kompreneble ĝis tiam tute ne sentis mankon de tiu aparato, kvankam mi daŭre celis min venĝi kontraŭ tiu nigra monstro (la "traction-avant"), kiu ŝokis mian homan senton, ĉe Citroeno, kiam mi estis spektanta la ĉenmuntadon, kiu pisigis la povrajn laboristojn en ilia kalsono! Efektive mi sukcesis min venĝi en 25 jaroj, post kiam mi ekstiris kaj ekpovis havigi al mi la monstron: mi dresis ĝin veturante (ĝis nun!) 800.000 km, jes, ekvivalenton de 20 ĉirkaŭadoj de la tuta tero. La maŝino, perfida, falsa, enladiĝinta en diabla spirito, du aŭ tri fojojn preskaŭ neniigis mian familion kaj min! Dank'al Dio (kial ne Dio? Ĉu vi preferas, ke mi diru: dank'al ioma ŝanco?!), ni ĉiuj ankoraŭ postvivas, kaj ni ne uzis la devigan sekurigan rimemon!*

*Kiel teknikisto, kiel favoranto de homa racio, racio, kiu kapablas mildigi, faciligi, eĉ demeti la grandan homan streĉon de l'laboro, kiel spekulema pigrulo, same pigra kiel ĉiuj homoj el la tersurfaco, mi plene akceptas ĉion teknikan, ankaŭ la aŭton. Nur ke... ĉion teknikan oni, la homoj, devas uzi racie, t.e. evitante la detruon de la homo kaj de la homa medio, la naturo. La tekniko ebligas, ke oni ne allasigu venenajn gasojn, kaj ni ne surdiĝu aŭ ne blindiĝu, la tekniko ebligas, ke simpla bato ne sentripigu nin kaj ne pistu nian cerbon. La tekniko preskaŭ ĉion ebligas... la negoco ne! Tio estas la detalo...*

La aŭtoj ne estas aparatoj, kiujn oni devus uzi en la mez-epokaj urboj de Eŭropo, la aŭtoj ne estas aparatoj taŭgaj por vivado en ĉielskrapaj turoj, ne estas faritaj por popolamasa svarmado. La aŭto estas ĝuste aparato, kiu ebligas al individuoj individue zumi, gapi en la mondo. Sen la aŭto, aŭ la primitiva trajno de nia amiko Kribo, Laŭte! ne ekzistus aŭ kostus centoble pli, Julia ne estus naskiĝinta, ni ne povus ĉi tie interrilati kaj ĉenleteradi, komunikiĝi en la tuta mondo. La aŭto ofte estas taŭga laborilo, utila distrilo kaj praktika vojaĝilo. Tiel, mi petas, ni ne kulpigu la aŭton pro ĝia ekzisto, sed ni kondamnu la homon, kiu fuŝe ĝin faras kaj uzas.

La aŭto, ĉiu maŝino, ne estas agresema, eĉ kiam ĝi aspektas monstro ; ĝi estas pli potenca, oble pli farpova ol la homo. Tiel, kiam la homo, kiu, jes, estas nature agresema, ekuzas la aŭton kaj provas integriĝi al ĝi, tiam aperas la danĝero : la materiigo de la "superhomo"... de la anĝelaspekta infaneto, kiu sopiras al la aŭtoludilo, al la juna ĉampiono, kiu celas ĉiam pli fulman rapidecon, ĝis la maturulo kiel mi, kiu emas gluti la mondon... aŭ almenaŭ ĉion vidi en la mondo per aŭtomobilo.

...Longe mi elpensadis pri maŝino, kiu povus anstataŭi la arkaikan aŭton, kie ne eblus okazi la mortigaj akcidentoj sur maltaŭgaj kaj naturdetruaj aŭtovojoj, kie ne estus venenaj haladzoj, kie komputora stirado evitigus nervajn streĉojn kaj aliajn sklerozojn, kie ne estus blindigaj lumoj kaj surdigaj kornadoj. Kial uzi petrolon aŭ kanbrandon (alkoholo, kiel en Brazilio), se ekzistas milionoj da perditaj ondoj el energio sur nia tero ? Ekzemple, la magnetoforto aŭ alia elektromagneta gioskopa procedo, kiu povus ebligi la konstruadon de iu speco de fluganta tapiŝo kiel en la orientaj rakontoj... aŭ eĉ funkciadon de aparato simila al flugbalailo de sorĉistino... sen ties polucia furzado, evidente ! Kiom malmodernas la tekniko !

**Suzanne :**

Mia familio (miaj gepatroj kaj mi) travivis la aŭtan jarcenton sen aŭto. Mi samopinias kiel Kribo pri la aĉaj flankoj de tiu ...plago. Ja mi konscias, ke ĉiuj laŭtuloj ribelos pri tia vorto !

Fakte, ĝi estas plago en urbo, en vizitinda sovaĝa loko, kies aspekton, ĉarmon, ĝi aĉe modifas. Ja, por iri en tian lokon, propra aŭto estas nepre necesa, ĝuste en mia regiono. Kelkfoje mi devas peti afablajn konatojn veturigi min ien (kelkajn

kilometrojn). Kulpas pri tio la publikaj servoj, ekzemple SNCF (franca fervojo kompanio), kiu forigis iujn fervojliniojn. Tial la senaŭtuloj havas malfacilaĵojn por vojaĝi. Tia malfacileco pli ĝenas la ankoraŭ bonfartantajn maljunulojn, kiuj estas vojaĝemaj. Mi tion spertas. Ĉar en nia socio oni konsideras nur tiujn, kiuj sekvas la ĝeneralan direkton ; la aliaj suferas diskriminacion. Publika servo zorgu pri ĉiu ajn civitano ; motivu la socian regadon ne la profitdono, sed la bezono. Ĉiam, pro tiu aĉa motivo, la benzino, almenaŭ en Francio, enhavas i.a. nocaĵojn plumbon ; sed la fabrikantoj asertas, ke modifi aŭ krei novan aŭton altigus ĝian prezon, kio estus malbona sur la merkato.

Ĉiam la samo okazas, kiam temas pri la sanstato de la plimulto. Ne inde granda elspezo ! De post 1914a eblus fabriki aŭtojn, kiuj elektre funkcius ; sed la potencaj petrolkompanioj malhelpis tion.

Teknikisto Garolo pravas dirante "ni ne kulpigu la aŭton... sed kondamnu la **homon**, kiu fuŝe ĝin faras kaj uzas". Tio ĉi valoras por ĉiuj maŝinoj, kiuj mildigus, faciligus, reduktus la templaboron ; sed tio ne okazas pro la agadaĉo de la komerco kaj de la politiko, kiuj konsideras, ke ekonomia prospero estas la sekreto de la feliĉo. Tial ili neglektas la laborkondiĉojn, ktp, de la laboristoj.

Multaj aŭtuloj, ĉe la stirilo, sin sentas potenculoj : la piedirantojn ili ne konas. Eĉ kiam ili staras antaŭ la trairejo.

Alia aĉa influo de la aŭto : ekde sia junaĝo la homoj identiĝas kun siaj motorcikloj ; ili ĝuas nur la rapidon aŭ la veturadon ; eĉ se ili trairas kamparon, ili ne vidas la naturon, la vegetalaron. Plie, tiu veturado malebligas la legadon, kiu naskus ilian personecon. Ili funkcias same kiel siaj veturiloj. La maturuloj same funkcias ; sed tiuj laboregu por akiri aŭton. Laboregi estas ilia nura zorgo ; pro tio ili fariĝas sklavo kaj ne klasbatalas.

Kribo "havas la impreson, ke li erare naskiĝis en la nuna jarcento". Mi daŭre strebis (as) al plibonigo de la homaro ; la filistroj pli kaj pli multiĝas, tiu konstato malesperigas min. Tial mi diras al mi : ĉu ne estus preferinde ne naskiĝi ?

Pridiskuti, ĉu la nuna scienco ĝenerale, aŭ la esploradoj aparte, estas por ĉiuj utilaj aŭ malutilaj, tio preskaŭ neniam okazas. La respondo ŝajnas tiel evidenta, pro kutimaj pensoj enradikiĝintaj ekde la infanaĝo kaj postlasitaj de jarcentoj... "Ĉiu scienca scio estas bona, kiu ajn estas ĝia kunteksto. Ĉiu teknika progreso estas bona, kaj konsekvence : scienca eltrovo estas ĉiam bona", ĉu ne ?

Nicole :

De almenaŭ 20 jaroj mi havas kaj uzas aŭtomobilon... Por ne aspekti tro kulpa aŭ stulta, mi unue "defendos" la posedantojn de aŭtoj ! Nuntempe estas la tria aŭto, kiun mi uzas; ĝi ne estas bela, nek luksa, nek potenca, mi ne ŝanĝis la modelon nek la potencon ne pro fiavareco, ne pro fidemo, sed pro "utileco" (ne neceso)... ĉar por mi aŭto estas ilo, rimedo teknika, kiu donas al mi diversajn servojn :

Estas veraj avantaĝoj posedi aŭton : senti sin pli sendependa por vojaĝi (foriri, reveni, kiam oni tion decidis; halti, kiam oni deziras; iri al lokoj malfacile atingeblaj, rapide proksimiĝi al lokoj, kiujn oni intencas viziti piede aŭ bicikle, alporti embarasajn pakaĵojn, pli agrable vojaĝi plurope, veturigi malsanajn aŭ maljunajn personojn, transporti infanojn...).


Eble tio estas "lukso", kiun oni tre multe koste pagas laŭ ĉiuj sencoj... La problemoj estas, ke pli kaj pli da homoj rajte deziris kaj deziras ĝui tiujn servojn, ke la aŭtoj ne estas sekuraj (ĉefe la plej malmultekostaj), ke ili polucias ! Jen la dilemo !

Konduko de aŭto ebligas disvolvado de pozitivaj kapabloj : memkontrolo, rapideco de refleksoj, atento, iniciativo, kuraĝo, sed bedaŭrinde ankaŭ de negativaj : malpacienco, regemo, agresemo, krudemo, perforto (eĉ ĝis murdo kelkfoje)...

Pro tio, neniam por mi aŭtoj kiel aliaj maŝinoj, eĉ la plej senmankaj, ne estas diaĵoj, al kiuj oni ĉion oferas, kaj mi scias kiom grave necesas esti konscia pri dependeco al iu ajn rimedo ĉu teknika, ĉu psika. Eblus ankaŭ longe rakonti pri personigo de la aŭtoj, ĉefe fare de la viroj, sed ne nur de ili, vidu la reklamojn !

Jes, aŭtoj kiel aliaj maŝinoj donas al la kondukistoj impreson esti "potencaj", eblas vera ĝuo. Tio paroksismigas individuismen, vantemon... Ne kulpas la maŝinoj sed la homoj, kiuj ne "superregas" la maŝinojn, kaj kiuj ne estas sufiĉe responsaj kaj konsciaj ; kulpas ankaŭ saturado de motorveturiloj, ĉefe en la urboj, en kiuj trafiko iĝas infera, neeltenebla.

Pro tio aperas provoj, iniciatoj, kiuj ŝajnas al mi pozitivaj sed ankoraŭ ne sufiĉaj. Sed ĉu ne venas ankaŭ tempo de



trudaj kontroloj fare de policistoj, de juraj decidoj pli kaj pli severaj kaj timigaj ? Antaŭ tiu situacio, iĝi aŭ resti aŭtomobilisto postulas fortan aŭdacon aŭ senkonscion aŭ saĝon, por mezure, racie uzi aŭton, ne konsiderante ĝin kiel unuecan veturilon. Konduki aŭton ne devige forigas, kontraŭas deziron, plezuron marŝi, bicikli, rajdi, boati, naĝi... Ke memvole, kiel eble plej ofte, aŭtomobilistoj forlasu siajn privatajn aŭtojn favore al la publikaj, la profesiaj ; ke la konsumantoj pli firme postulu fidajn modelojn ; ke ĉiuj pli aktive defendu sian vivmedion, tio alportus taŭgajn solvojn al la nuntempa trafika senelirejo.

Mi mem devus tuj komenci... ne estas tiel facile ! Kiom da kontraŭdiroj en ni kaj en nia moderna socio ! estas malfacile sin trovi ; ne, tiu ĉi jarcento ne estas paradiza por la plej multo... sed ĉu la pasintaj estis pli plaĉaj ? En ĉiu epoko certe necesis esti klarvida, responsema, havi koran, spiritan, fizikan fortojn por vivi aŭ postvivi... sed jen alia debato...

ueli haenni :

Ŝajnas, ke mi estas feliĉulo : Por "emancipiĝi", mi provis kelkfoje la tabakfumadon sed tiel tuis kaj ne ŝatis la fumon, ke mi neniam vere ektabakfumis. Iomete pli malfacila estis la afero de aŭto : kiel medicina studento, mi opiniis, ke estus bone, se mi scipovus stiri aŭton. Do mi estis devigata (?) aĉeti ekzempleron. Nun kial feliĉulo ? - Mi uzis artifikon por devigi al mi forigi la maŝinon post la eklernado. Mi rakontis al multaj el miaj gekamaradoj, ke post unu jaro mi ne plu posedos la ĵus akiritan aŭton. Tiamaniere, mi protektis min kontraŭ mia propra mallaboremo.

Mi opinias, ke aŭto estas tiel danĝera kaj malsaniga por la tuta homaro, ke nur pro evidenta neceso (ekzemple ĉe kripluloj) oni devus uzi ĝin.

Feliĉe mi scipovas stiri ne nur aŭton, sed ankaŭ biciklon. Mi posedas kvar biciklojn. Unu 10-kupla por ĉiutaga uzo en mia hejmurbo Bern kaj unu eta, faldebla, tri-kupla "Bickerton Portable", biciklo, kiu pezas nur 9,1 kilogramojn kaj tre ege utilas, kiam mi vojaĝas per trajno kaj buso por la lasta (aŭ komenca) parto de l' vojaĝo, kie alikaze mi devus aŭ marŝi aŭ petveturi aŭ taksii.

En ĉi tiu parto de Eŭropo (meze de Eŭropo, Bern) jam sufiĉe multaj homoj scias, ke ne nur sed ankaŭ "dank" al" ilia kontribuo aŭtomobila, la arbaroj mortadas, kaj se la svisa registaro ĵus decidis, ke ekde nun la geaŭtomobil-

istoj rajtas sur aŭtoŝoseoj vojaĝi maksimume nur 120 km-ojn hore, ne plu 130 kiel antaŭe, ĉi tiu fakto estus vere ridinda, se ĝi ne estus plorinda...

**Jakelino Lépeix :**

### **Publikaj transportoj en orienteŭropaj landoj**

En la kadro de la debato pri aŭtoj, mi volis ekspliki, ke la nura motivo, kial mi ne havas aŭtomobilon, estas, ke mia sano ne ebligas al mi veturi, kaj montri la multegajn problemojn, kiujn devas alfronti virino sen aŭtomobilo. Sed pri tio jam verkis la aliaj debatantoj. Jes, kiel diras Kribo, junulino, kaj ino ĝenerale, povas "eskapi" la ĉasantajn virojn, nur kiam ankaŭ ŝi translokiĝas ŝirmate en sia kvarrada ferskatolo. Al tiu argumento iam respondis mia patrino : "se ci havas aŭtomobilon, mi timus, ke ci povus esti agresata nokte en parkejo". Do eble ankaŭ la vivo de aŭtomobilistino ne estas tiel sekura kaj agrabla, kiel imagas mi, kompatinda piedirantino.

Pri la komforto de francaj trajnoj mi ne estas tiom (aŭ tiel) entuziasma, kiel (aŭ kiom) Valo. Sufiĉe agrablaj estas la vagonoj kun kupeoj. Male, ege malagrablas la turbintrajnoj kaj la koraltrajnoj : mi supozas, ke la fervojistoj, kiuj planis tiajn trajnojn, antaŭe laboris en fabriko, kie oni enskatoligas sardinojn. Malfacile familio povas komferte vojaĝi per tia trajno, ĉar la plimulto de la sidlokoj estas tiel aranĝita, ke oni vidas nur la dorson de la sidloko de la antaŭa vojaĝanto. Se oni alportis libron, oni povas ĝin legi dum la tuta vojaĝo, sed se oni deziras interkonatiĝi kun aliaj homoj, tio apenaŭ eblas. Kaj ĝojinde mi ne havas tro grandajn kruojn.

Konsilo por kompatindaj senaŭtuloj, kiuj volas komferte vojaĝi nokte de Parizo al Strasburgo kaj ne havas kuŝlokojn : eniru en aŭstrian vagonon por sidontoj. En tiuj vagonoj la sidlokojn oni povas tiri al la horizontala pozicio, kaj kuŝi sur ili. Se la kupeo estas plenplena, t.e. se estas en ĝi homoj, ne estos granda komforto. Sed se oni estas nur tri, aŭ malpli, oni povas sufiĉe bone dormi. Kial nia franca SNCF (ŝtata fervoja societo) ne aĉetas tiajn komfortajn vagonojn ? Nu, verŝajne por ke ni plu pagu por kuŝlokoj. Tamen, laŭ mia frato Alano, kiu multe trajnis nokte dum sia profesia formado, oni dormas pli bone en vagono kun sidlokoj ol sur kuŝloko. Tio ne estas mia konkludo.

\*  
\* \*

Ĉion alian, kion mi povus diri pri transportoj en Okcidenta Eŭropo jam diris la aliaj debatintoj. Tial mi konigos mian sperton pri publikaj transportoj en orienteŭropaj landoj, kie posedo de privata aŭtomobilo estas ankoraŭ lukso :

Antaŭ kelkaj jaroj, kiel bona aktivantino por ekologio, mi pensis, ke oni devus anstataŭigi privatajn aŭtomobilojn per publikaj transportoj. Sed poste mi iris promeni en pluraj urboj de Orienta Eŭropo, i.a. en Varsovio kaj en Bratislava. Nu : tiuj, kiuj konas la parizan metron je la 18a horo imagu, ke sama situacio prezentigis en la aŭtobusoj kaj tramoj de Varsovio aŭ Bratislava preskaŭ dum la tuta tago. Se mia edzo ne malŝatus piediri (jes, ankaŭ homoj sen aŭtomobiloj foje malŝatas marŝi), mi vizitus Varsovion sen iam ajn uzi aŭtobuson, ĉar tio estas malagrabla.

Kio veras pri busoj kaj tramoj interne de urbo, veras ankaŭ pri la trajnoj por iri de urbo al alia. Post nia geedziĝo, mia edzo kaj mi volis iri de Varsovio al Krakovo per trajno. Unu problemo : ni planis vojaĝi lunde, kaj, pro malfacilaĵoj ĉe la varsovia polico pri alilandanoj, ni povis foriri nur marde. Mia edzo devis grumbli ĉe pluraj fervojistoj, ĝis li trovis iun sufiĉe altrangan por doni al li la permeson ŝanĝi la tagon de nia veturado (en Francio, bileto por longa distanco validas dum 2 monatoj, do nenio okazas, se oni lastatempe ŝanĝas la daton de la vojaĝo). Mia edzo aĉetis biletojn por la unua klaso. Do ni eniris unuaklasan vagonon, kaj ĝi estis tiom plenplena, ke ni devis resti en la koridoro (estis sidiletoj en la koridoro). Do mi diris al li : "Kial vi aĉetis unuaklasajn biletojn por vojaĝi en koridoro ?". Respondo : "Ĉar mi timis, ke en duaklasan vagonon vi eĉ ne povus eniri". Tio okazis fine de novembro, do ekster periodo de amasaj vojaĝoj kiel la jarfinaj festoj.

En Pollando, kiam vojaĝo necesigas trajnŝanĝon, ĝi estas vera aventuro : multegaj trajnas alvenas kun malfruo. Do, ĉu vi trovos la duan trajnon en la stacio, kie vi devas ŝanĝi, tio dependas, ĉu via unua trajno alvenos kun pli aŭ malpli da malfruo en la stacio, verŝajne estos ia malfruo, sed, se ankaŭ via dua trajno alvenos kun malfruo en la sama stacio, vi havas ŝancon ĝin tamen atingi. Se vi volas viziti amikon en alia urbo, ne sciigu la horon de la alveno, tio ne multe utilas. Kiam vi finfine alvenos, vi povos provi telefoni al la amiko... se la telefono konsentos funkcii, kio estas foje troa postulo ! Se ne funkcias la telefono, kaj se vi havas nur la adreson de la amiko en nekonata urbo, eble vi povos uzi taksion, sed taksio estas tiom malofta kiom multe-

kosta. Se dum la sama tago polo spertas, ke trajno alvenis konforme al la hortabelo, ke la telefono funkciis, kaj ke li tuj trovis taksion, li urĝe iras al Czestochowa por danki al la Nigra Virgulino pro neantaŭvidita miraklo.

La socialisma sistemo foje havigas avantaĝojn (ekzemple, bileto por varsovia buso estas valida ankaŭ por krakova buso, ĉar la busoj dependas de la ŝtato), sed foje ĝi naskas problemojn. Ekzemple :

- Iam SAT kongresis en urbeto Lektur'. En Lektur' ne estas stacidomo, sed oni povas veturi tien per aŭtobuso, kiu ekveturas de la stacidomo de Aĝeno. Kompreneble, dum la unua tago de la kongreso, multaj homoj volis iri samtempe de Aĝeno al Lektur'. La fervojistoj de Aĝeno decidis funkciigi duan buson. Fervojisto diris al mia amiko : "Verŝajne estos same dum la lasta tago de via kongreso, kiam la kongresintoj volos ĉiuj samtempe iri de Lektur' al Aĝeno, do diru al la organizantoj, ke, se ili volas plian buson, ili telefonu al la stacidomo de Aĝeno kaj petu paroli kun sinjoro ...".

- en 1980, mi feris dum du semajnoj en Miedzygorze, montara vilaĝeto de Pollando, kie okazis internacia renkontiĝo de esperantistoj. Ankaŭ Miedzygorze estas atingebla nur per aŭtobuso. Mi ne scias, kio okazis dum la unua tago de la renkontiĝo, ĉar mi alvenis nur poste. Sed dum la lasta tago, ĉar ĉiuj esperantistoj volis uzi la saman buson samtempe, ne estis loko por ĉiuj en la buso. Mi retrovis miajn refleksojn de iama liceanino de pariza suburbo, kaj mi sukcesis eniri en la buson, lasante ĉe la haltejo polajn esperantistojn pli mallertajn aŭ pli maljunajn ol mi. Tio ne estis tre karitata, sed tio estis racia : mi nepre devis esti en Wroclaw antaŭ la alveno de la internacia trajno, kiu veturigos min al Francio. Internacia trajno estis nur unu tage, se mi ne atingus ĝin, mi devus iri al la polico por plilongigi mian vizon kaj verŝajne atendus min multaj komplikadoj. Mi pensis, ke polaj esperantistoj restontaj en Miedzygorze pro sia mallerteco havos malpli da embarasoj ol tiuj, kiuj minacas min. Al la polaj bonŝanculoj, kiuj sukcesis eniri en la buson mi demandis, ĉu ne eblas meti plian buson : la renkontiĝo estis planita longtempe antaŭe, kial la organizantoj ne avertis la busan administracion, ke multaj homoj deziras forlasi Miedzygorze samtempe ? Respondo de la poloj : "Se unu buso estas planita, ne eblas ŝanĝi la planon, metante du busojn".

Mi skribas tion ne por pravigi la kapitalisman sistemon, sed mi ŝatus, ke la francaj gejunuloj, kiuj veturas per aŭtomobiloj al ekologiaj kunvenoj, kie ili fumante diskutados pri

plibonigo de la okcidenta socio, havu iomete pli da realismo. Eble dum la junaĝo de Valo la publikaj transportoj bone funkciis en Francio, sed tiam la proporcio da kamparanoj estis pli granda, kaj malmultaj kamparanoj emis vojaĝi al grandaj urboj, aŭ eksterlanden. Jes, Kribo, ci erare naskiĝis en la nuna jarcento. En 1985, la vojaĝemo de la francoj estas tia, ke oni ne povus ĝin kontentigi per la rimedoj, kiuj ekzistis antaŭ la milito.

Lasta detalo : en Pollando, veturado per buso kostas pli, ol la sama distanco per trajno. Mi ne scias kial. Verŝajne la kostoj de la riparado de la ŝoseoj pagas la busvojaĝantoj.

### **Michel BAURET :**

*La antaŭjuĝoj aperintaj en la lasta L! (januaro/februaro 85) pri aŭto, aŭtaĉo, ktp, ĝenis min, pro sia morala sinteno. Ĉu aŭtomobilo incitas homon, igas lin pli agresema ?...*

*Certe tranĉilo estas bezonata aĵo, sed ĝia uzado povus iĝi danĝera... Tiel oni ne ŝatas aŭton, oni uzas ĝin ! Mi opinias, ke ĉiu objekto, aĵo uzata en nia konsumema socio rolas ion ; se ne, ĝi malaperus...*


*La dua kritiko, kiun mi faras, estas tiu stranga kaj danĝera sopiro al pasinteco... la ĉiama sopiro al la perdita paradizo !*

*Mi opinias, ke tiu (teoria aŭ abstrakta) rifuzo al la aŭtomobila fakto praktike ne estas eltenebla. Estus preferinde klopodi, por ke aŭtomobilo ne invadu urbon kiel ĉefa veturrimedo. Ja, en urboj, aŭto misinfluas vivkondiĉojn (polucio atmosfera, bruo, danĝero, ktp) sed, iom inverse, ĝi plifaciligas vivon de la kamparanoj, kiuj nun povas senprobleme veturi. Mi substrekis el artikolo tiun signifoplenan frazon : "en mia vilaĝo... preskaŭ neniu vojaĝis". Finfine, mi aludas, ke aŭto estas pli adekvata kaj pli malmulte kosta grupveturrimedo ol fervojo aŭ aviadilo. (Tiu rimarko koncernas kompreneble "okcidentajn" landojn).*

*Do, praktike, nepras klopodi limigadon de aŭtomobiloj nur en urbaj zonoj, kie ili invadis la tutan ŝoseon. Ni propagandu por :*


- biciklaj ŝoseoj
- poraŭtobusaj ŝoseoj
- denova starigado de tramlinioj (elektraj, ne poluciemaj)
- senpaga uzado de aŭtobusoj (por ke homoj estu konvinkataj per materiala argumento).





ĈU AŬTO, ĈU NE?  
ELEKTU LA PLEJ  
AVENTURAN VETURILHEDON!

ĈU ŜATAS NUITE MARRINAFERON. ĈU ANKŬU VI?



Tamen, la urbestroj ĝenerale favoras al aŭtomobilistoj. Estis malfermataj subteraj autoparkoj, kies konstruado multekostas; la centraj placoj estas tute transformitaj por plifaciligi aŭtomobilan cirkuladon. Baldaŭ, same kiel en Usono, aŭtoŝoseoj penetros ĝis urbaj centroj. Tio signifas, ke tiu aktivado estas politika...

Do, karaj kontraŭ-aŭtomobilistoj, mi konsilas al vi tuj kontakti asociojn de konsumantoj, kvartalajn grupojn, tiujn, kiuj grupe provas, ke ŝanĝiĝu vivo en urboj!

- en Francio, U.F.C. : Federacia Unuiĝo de Konsumantoj
- C.S.C.V : Sindikata Konfederacio por Viv-kadro
- C.S.F : Sindikata Konfederacio de la Familioj.

Kribo :

### Pafi kaj stiri en la bona direkto...

Al amiko Michel mi rimarkigu, ke li aplombe nomas "antaŭjuĝo" la objektivan konstataĵon de faktoj, kiujn vidas eĉ aŭtomobil-uzantoj, eĉ li mem! Sufiĉas legi la lastan parton de lia kontribuo por konstati, ke ankaŭ lin ĝenas la trouzado de aŭtoj.

Li do devus danki al ĉiuj, kiuj, kiel Ĝiz kaj mi, ne havas aŭton, ĉar tiuj lasas lokon al aŭto-veturantoj! Tio estas ne nur ŝerco, sed aludo al speco de etiko, aŭ pli ĝenerale al ekologio - ni estu laŭmodaj!

Estas ja antaŭjuĝo kredi, ke ĉiu sinteno bazita sur moralo estas nepre antaŭjuĝo! Michel ja scias, kio fariĝis la speco de socialismo, kiu forĵetis etikon aŭ moralon el sia ĉiutaga praktikado. Ĉu estus kondamninda la objekto, kiu elvokas moralajn principojn por rifuzi la militservon, kaj ĉu pli aprobinda tiu, kiu banale diras, ke li ne volas fuŝi unu jaron de sia vivo?

Kvankam la nura vorto "moralo" hirtigas nian amikon, ĉar ĝi plejofte kamuflas ne ĉiam moralajn aferojn - kaj antaŭjuĝojn -, li tamen iomete pripensu: ĉu ne ekzistas en la homo kapablo tiri el la observado al la realaĵoj kondukregulojn, kiuj kongruas kun logiko? Mi preferas ne uzi la vorton "racio", kiu same kiel "moralo" povas kamufligi eĉ abomenaĵojn. En la franca lingvo oni uzas la esprimon "bon sens" (= klarvido), kiun oni ja povas vortlode kompreni "bona direkto". La ĝeneraligado de privataj aŭtoj iras, laŭ mia logiko, en la malbona direkto, ĉar 1) ĝi kuŝas sur malŝparado de krudmaterialoj fare de iuj privilegiuloj (ke la laborista klaso en okcidentaj landoj apartenas al tiu privilegiularo, ŝanĝas nenion al la afero), 2) ĝi venenas ĉies vivon, eĉ tiun de la neposedantoj de aŭtoj.

Cetere, la samon oni povus diri pri tabak- aŭ viandkonsumado. Oni plantas tabakon sur plej fekundaj grundoj, oni bezonas multe pli da surfaco por fabriki animalajn proteinojn ol por vegetalaj. Kiam oni ne konscias pri tio, ne estas problemo. Sed se oni komprenis, ke ĉies individuaj sintenoj kondiĉas la tutan funkciadon de la homa specio, kaj se oni volas konduki konsekvence, **logike**, tiam oni strebas kiel

eble plej respondece sinteni. Tian specon de "moralo" mi ne opinias kondamninda antaŭjuĝo.

Kaj fine, pri la ŝablono "sopiro al la perdita paradizo" : Jes, tiu sopiro ekzistas ĉe iuj homoj, sed ne nepre ĉe ĉiuj aŭto-bojkotantoj. Same kiel tiuj, kiuj kondamnas atomcentraĵojn ne nepre sopiras al kandeloj. Mi opinias, ke tiujn argumentojn oni prefere ne uzu inter esperantistoj, kiuj ja laŭ difino, ne sopiras al pasinteco, sed **aspiras** al pli hela estonteco (kvankam, laŭ mi, la rezultoj ne multe diferencas !)

La "bonan direkton" ja indikas Michel (ŝoseoj por bicikloj kaj busoj, **sopiro** al tramlinioj, senpageco de publikaj transportoj) kaj nenion alian deziras la aŭto-bojkotantoj, krom akceli la procezon per propra konsekvenca sinteno. Logike, se plu multiĝas la homaro, kaj se ĝi plu strebos al reduktado de ĉiuspecaj privilegioj, la privata aŭto (same kiel multaj aliaj privilegioj de la okcidenta homo) estas kondamnenda, ne nome de malprecizaj moralaj principoj, sed pro tute materialaj konsideroj.

Egoisme mi konfesas, ke tute ne ĝenas min la urbaj trafik-embarasoj : kiel piediranto tie mi ĉiam bone elturniĝas, kiel eble plej malmulte spirante kaj draste limigante la daŭron de la "vizito" ! Ĉiam egoisme mi rimarkigas al Michel, ke mi, kiel loĝanto en kamparo, tute ne deziras aktivi por "puraj" urboj, se ties merdo devas elŝutiĝi ĉiun semajnfino en kamparojn, rando de kies vojetoj la urbanoj elaŭtiĝas por feki siajn konservskatolojn kaj plastajn ujojn...

Sed mi estu ĝentila... kaj objektiva : ankaŭ kamparanoj ne estas senpekaj en siaj ĉiutagaj aktivadoj : la biologia agrikulturo konvinkis nur malmultajn ; imagu, oni malfacile persvadis ilin uzadi ĉiujn "modernajn" rimedojn, kaj nun iuj frenezuloj asertas al ili, ke la ĥemia vojo estas erara, ke traktoroj tro profunde fosas, ke estas stultaĵo bruligi foliojn kaj pajlon... Ni ne miru pri iliaj foje "krudaj" reagoj. Sed tio povus esti temo de alia debato, ĉu ne ?

**P.M.G.** : *De kelkaj jaroj mi veturas al mia laborejo per fervojo. Estas pli agrable por legi kaj skribi aŭ pli ekzakte ĝi donas tempon por tio, dum aŭte oni ne povas. La nura malagrablaĵo estas la fumantaj vojaĝantoj, ili tute ne kapablas legi la kvarlingvan kaj simbolan ŝildon "NEFUMANTOJ". Terure kiom la tabakfumo fuŝas la vidon kaj komprenkapablon de la homoj ! Bedaŭrinde por iri aliloke, ĉu al pli malgranda urbo ĉu al pli granda, la fervojo aŭ tute ne iras, aŭ necesas triobla vojaĝo tra Parizo, metroo, ktp, tute ne eblas!*

**LELEGINTO** (de L.S. 58) :

Kribo pli kaj pli havas la impreson, ke erare li naskiĝis en la nuna jarcento. Li finis per 5 demandoj. Tro multe por respondi ilin. Thérèse objekte pezas la aspektojn kaj kapklinas al la opinio, ke ni ne vere povas ŝanĝi la evoluon de tiu medio. Bedaŭrinde, ĉar iam tiu evoluo devigos nin al absoluta ŝanĝo. La socia transformiĝo estas neevitebla. J.G. montris detalajn historiojn. Mi naskiĝis en 1910, ne en hospitalo. Stultaj estas la protestoj de sindikatoj, ĉar finfine la produktado de aŭtoj estos haltigata pro manko de benzino kaj spaco sur la vojoj por povi veturi. Ĝiz el L. Plačas al mi la neserioza kontribuado. Almenaŭ subkomprenante la seriozon de kelkaj diroj. Li pravus, ke li rifuzas kunlabori kun la malamiko. Memintervjuo. Multaj negativaj aspektoj kaj pledo por publikaj servoj. Tamen li opinias, ke la estonto por aŭto ŝajnas multpromesa. La lastan frazon mi ne komprenas. Valo. Tre bona pledo por fervoja transporto. Mi substrekas lian opinion, ke malprave oni pli kaj pli fermas kaj malkonstruas utilajn fervojliniojn. Prave en 4 K de la XXa jarcento la fervojo ekzistadas kaj veturas futuron.

(eventuale, pliaj vidpunktoj en venonta L!)

\*\*\*\*\*

Por nia medito :

**Fragmentoj  
el leteroj de E. LANTI**

"... la Rajto devas havi la juston kiel fundamenton kaj esti universale aplikata... Mi konsideras, ekzemple, ke la plenumo de promeso, libere farita, estas morala principo nepre obeenda. Sed proleto, malsatulo, kiu akceptas plenumi taskon ĉe mastro kaj promesas bone laboradi, ne faras sian promeson libere kaj sekve li povas tute normale senti sin nedevigata plenumi sian promeson. Kelkriate la marksistoj estas pravaj en sia argumentado pri rajto kaj devo. Ĝis nun preskaŭ ĉiam burĝaj moralaj nocioj estis rezulto de inter si batalintaj fortoj. Sed, ĝuste pro tio, vera revolucio ĉesigus tiun staton kaj starigus la rajton sur la justo, sur la moralo kaj ne sur ia ekvilibro de fortoj. Se tiel ne okazos, la ekspluatitoj fariĝos ekspluatantoj kaj principe nenio ŝanĝiĝos. La Sovetia eksperimento pruvas tion sunklare. Se du najbaroj vivas pace nur pro konscio, ke ili estas same fortaj, tia paco ne povas esti tre longdaŭra. Certe okazos, ke unu de ili, prave aŭ malprave, opinios,

ke li nun povas venki en batalo kaj li ekbatalos. Ĉar moralaj principoj ne ekzistas konkrete, estas la tasko de la edukado planti ilin en la konscienco de l' homoj, precipe de la infanoj. Kaj se homo preferus morti ol agi maljuste, ĉu tio estus pli stulta ol morti kaj mortigi pro patrio ? Milionoj da homoj konsentas al morto por sia respektiva patrio, tial ke en ilia junaĝo oni naskigis tiun devosenton en ilia konscienco. Sed mi ne scias, kial mi tiel babilas, ĉar kredeble vi jam estas konvinkita pri tiuj veraĵoj..." (Letero al kdo B., 16.4.1938)

"... Pri vegetarismo mi diris kelkajn pensetojn en "Ni ne digu la racion" (pĝ. 87 de l' **Vortoj**) kaj ĵus relegante ilin, mi ĝoje konstatas, ke ili ne estis tute malsaĝaj. Ni ja estu dubemaj pri ĉio, aŭ pli ĝuste, pri ĉiu ismo.

- Ĉu ankaŭ pri sennaciismo ?

- Jes ! kaj tio igas min diri, ke eble vi ne estis tute pravaj, malakceptante la naciisman artikolon de Degenkamp. Ĉu ne estus pli saĝe publikigi ĝin kaj - rebaton ? ..." Kompreneble, mi ne povas havi definitivan opinion, ĉar la artikolon mi ne legis... " (Letero al kdo B., 18.5.1938)

"... Vi preterlasu nenium okazon substreki kaj akcenti, ke nenial SAT devas esti influata de la ŝanĝiĝema taktiko de partioj. La tuta problemo restas, kiel atingi, ke la SAT-anoj estu unue esperantistoj. Vi scias, ke mi mem ĉe la komenco deklaris, ke oni devas esti nur... due esperantistoj... Mi eraris..."

(Letero al kdo B., 3.6.1938)

"... Nu, mi konsentas, ke la diversspecaj naciistoj havu la liberon kaj rajton buĉi sin reciproke - sed protestas pro tio, ke ili perforte devigas sennaciistojn partopreni en la gloraj epopeoj militaj..." (Letero al kdino H., 24.7.1938)

"... Se la homaro ne refalos tute en barbarecon, ĝi certe pli-malpli frue orientiĝos laŭ la SAT-direkto. Nia tuta malfacilo kuŝas ĉefe en tio, ke la homoj ĝenerale volas tujan konkretan rezulton, eĉ se tiu rezulto estas tute ŝajna kaj vere senestonta. Sed neniam forgesu, ke en la **Manifesto** estas dirite, ke ni restas en kontakto kun la laboristaro kaj partoprenas ĝiajn batalojn, kiam ili estas klasecaj kaj ne naciecaj."

(Letero al kdo B., aŭg. 1938)

Se iuj el tiuj ĉi-supraj vidpunktoj vekos ĉe leganto diskutemon, L! volonte publikigos. Sed, kompreneble, ne LANTI povos rebati en la sekvonta numero...

## ENKETO ĉe la JUNULARO

Esplorgrupo pri socia psikologio dezirus ekscii, kiel hodiaŭaj gejunuloj (ĉirkaŭ 16-30-jaraĵ) de la mondo prezentas al si sian socion, kiel ili vidas la sociajn rilatojn. Kompreneble ni pensas pri la E-movado, ĉar la esperantista junularo estas tutmonda ; do ni povas atendi tre diversajn respondojn. Samtempe la esperantistoj estas eble specifaj. Ĉu la respondantoj sentas ian specifecon ?

En ĉiu medio kelkaj individuoj estas rimarkataj, distingataj. (Oni admiras iufoje, aliafoje oni timas, envias, kompatas aŭ malestimas aliuojn...). Iuj distingas individuojn ĉie sammaniere. Aliaj observas malsame, depende de tio ĉu ili estas en sia laborloko, en sia familio, sportante aŭ babilante kun amikoj.

- 1) Kiajn individuojn oni rimarkas ?
- 2) Kio en tiu ĉi rimarko dependas de la medio ?
- 3) Ĉu (kaj se jes, kiel) la epoko influas la reagon de la homoj ?
- 4) Ĉu la junuloj sekvas la maljunulojn aŭ kondutas alie ?
- 5) Kio okazas al tiuj, kiuj ŝajnas diferencaj ?
- 6) Ĉu ekzistas "esperantistaj" agmanieroj, aŭ ĉu la esperantistoj reagis, kiel aliaj anoj de la medio ?

Ni ŝatus ricevi informon pri

\* sekso, \* aĝo, \* profesio kaj \* loĝlando de la respondantoj.

Bonvolu sciigi ankaŭ,

\* kiamaniere vi eksciis pri nia enketo.

Ni certigas diskretan uzon de la respondoj, kaj publikigos la rezultojn de tiu ĉi enketo tie, kie vi legas nian demandaron. Ni esperas, ke viaj respondoj kondukos nin al pli precizaj demandoj. Antaŭe dankon.

Bonvolu sendi viajn respondojn al

A C R E

292, Bd des Bressons

F - 13300 Salon de Provence (Francio)

\*\*\*\*\*

A C R E estas asocio de esploristoj pri socia psikologio

\*\*\*\*\*

**Deziras korespondi** kun tuta mondo pri literaturo, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn, 14-jara lernantino :

Magdalena WROCŁAWSKA, Grabonóg 62/1, PL 63-820 PIASKI

\*\*\*\*\*

Internacia E-semajno okazos en Sète (mediteranea marbordo) de la 15a ĝis la 22a de septembro. Sin turni al : Y. Vierende, 5 rue du Dr. Roux, F 34000 MONTPELLIER

Programo : diversnivelaĵoj kursoj gvidotaj de Ges-roj Tyblewski kaj Jeanine Vincent, ekskursoj, amuzaj kaj kulturaj programoj. E-ekzamenoj laŭpete.

## Partoprenu al la INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO !

Lage Vuursche (Nederlando) : 13.-20. de JULIO '85

**LOKO** : Lage Vuursche situas meze en Nederlando, en arbarriĉa regiono. La naturamika junularo havas tie propran domon kun malgranda kampadejo. En '84 la domo estis renovigita. La junulara centro ne estas senalkohola.

**DATO** : De la 13a ĝis la 20a de julio, do ĝuste antaŭ la Internacia Junulara Kongreso en Germanio. Ni tamen ne volas pli ol 60 partoprenantojn !

**TEMOJ** : Matene okazos debatoj, rolludoj, diskutoj pri la temoj : "Junularo kaj laboro" kaj "Junularo kaj diskriminacio".

**KROME** : okazos kurso por progresantoj matene. Ni volas multe bicikli, promeni kaj naĝi en la ĉirkaŭaĵo. Eble ni remos ankaŭ sur lago.

**EKSKURSOJ** al Amsterdam kaj Utrecht, al naturtereno, kasteleto en la ĉirkaŭaĵo, ktp.

En la junulara centro ni volas muziki, kanti, popoldanci, (oni instruu la naciajn sportojn), baki krespojn laŭ ĉies gusto kaj maniero, prepari kaj ludi teatraĵojn, kaj... kaj...

**ORGANIZO** estas en la manoj kaj kapoj de SAT-Junulfako kaj FLE, la nederlanda laborista asocio. Tiu ĉi renkontiĝo estas la dua post la sukcesplena en Villandraut, Francio.

Nur por homoj, kiuj ŝatas simplecon, komunan preparadon de manĝoj, libervolan programon, frenezigajn diskutadojn... Ekskursoj libervole elekteblaj. Pliaj informoj ĉe :

INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO, Postbus 425  
NL - 2100 AK Heemstede, Nederlando.

\*\*\*\*\*

### Universitata disertacio pri Esperantaj libraroj

En junio 1984 Eleonora Worsztynowicz prezentis ĉe la Universitato de Poznań sian licencian disertacion s.t. "Kolektoj de Esperantaj eldonaĵoj". Tiu 180-paĝa disertacio, kiun alte aprezis Libroscienca Instituto kaj polaj esperantologoj, donas multflankan analizon laŭ historio kaj nuna stato, kaj ankaŭ eltiras konkludojn por estonto lige kun centjariĝo de Esperanto.

Adreso de la aŭtorino : Eleonora Worsztynowicz, ul. Poznańska 26/37

PL 63-100 Ś R E M, Pollando

\*\*\*\*\*

Dezirias korespondi : Alejandro Lopez de Vergara y Mendez  
Rb. Gral Franco, n°83-dcha  
E - 38004 SANTA CRUZ DE TENERIFE, ISLAS CANARIAS.



## VORTOJ DE MALJUNULO

---  
valo  
---

### LA VOJO

En la lasta jarsemajno, kiel kutime, mi dissendis kelkajn ilustritajn poŝtkartojn eldonitajn de UNICEF, organismo dependa de UNESKO. Sur tiuj kartoj estas presitaj bondeziroj kaj klarigoj pri la bildo en kvin, ses lingvoj. Naciaj lingvoj.

Antaŭ tridek jaroj, elokventa pledo de Lapenna eltrudis de UNESKO belan rezolucion favoran al Esperanto. Ĝi naskis grandan esperon tra la tutmonda esperantistaro. Tridek jarojn poste, UNESKO ankoraŭ ignoras la lingvon internacian.

Jam plurfoje mi tion diris, ni devas rezigni pri jena sobra konstato : niaj klopodoj por akiri al nia afero favorajn deklarojn de politikaj eminentuloj aŭ de oficialaj instancoj atingas nur efemeran sensekvan rezulton. El ĝi venas nenio konkreta.

Ne tiel ni akcelos la progreson de nia movado. Sed se ĉiu el ni sukcesus varbi du aŭ tri individuojn, kaj se ĉiu el tiuj ĉi same agus, post kelke da jaroj la nun eta diligenta kolegaro kreskus. Jen estas la vojo.

Inter niaj konatoj ni tro ofte aspektas kiel fantaziaj originaluloj, kiuj konservas sian lingvon por sia propra uzado kaj flegas ĝin kiel amatan ĉevaleton. Ni peni konvinki ilin, ke temas ja pri vivanta afero, per kiu ni efektive rilatas kun ĉiulandaj amikoj, kaj havigi al ili la deziron imiti nin : ni propagandu per praktika ekzemplo pli ol per bombastaj proklamoj.

### PRI KINO KAJ TABUOJ

En januaro 1985 aperis en Francio filmo titolita "Mi salutas vin, Maria". Per ĝi skandalitaj, iuj asocioj postulis, ke ĝi estu malpermesata. Kiuj asocioj ? Ĝuste el tiuj, kiuj, kelkajn monatojn antaŭe, laŭtege kriadis pri atenco al libero

okaze de la kverelo pri ŝtata financado al la privataj lernejoj.

Nu, sinjoroj, kiel iu filmo povas atenci vian liberon ? Kiu trudas aŭ devigas vin spekti tiun filmon ? Ĉu vi ne rajtas ĝin bojkoti ? Aŭ, se vi preferas, ĝin spekti kaj prifajfi ? Tio estas ja rajto aĉetata kune kun la enirbileto.

"Libero, kiom da krimoj oni faras en cia nomo!" diris civitanino Roland irante al gilotino. Libero, kiom da maljustaĵoj oni diras en cia nomo ! Kiom da perfortaĵoj oni kulpas en cia nomo, kiam regas maltoleremo !

Tial, ke la katolika religio estas tiu de la plimultaj el la francoj, ĝiaj kredantoj pretendas devigi aliajn al respekto, se ne al kulto al Sankta Virgino Maria.

Ne pridubable, se la Eklezio refariĝus tiel potenca kiel en la Mezepoko, tiam refunkcius ne nur la cenzuro, sed ankaŭ la inkviziciaj tribunaloj, kaj restariĝus brulŝtiparoj. Por ne esti bruligota, mi devus kulti al la Sankta Virgino kaj al la Sankta Triunuo.

Same la patriotoj devigas min stari kaj demeti mian kapveston, kiam mi aŭdas la Marseljezon. Mi devus saluti regimentan flagon, krucon portatan en procesio, funebran ĉaron transportantan kadavron al tombejo. Kial ne ankaŭ la ĉapelon de Gessler ?

Mi volonte akceptas la devigon eniri nudkape en preĝejon aŭ nudpiede en moskeon, ĉar mi estas libera ne eniri en ilin. Sed mi deziras konservi la rajton pensi kaj diri, ke tiaj gestoj ŝajnas al mi stultegaj. Kaj mi deziras konservi la rajton vidi filmon aŭ alian spektaklon, kiu ne respektas iun religian aŭ moralan tabuon. Sen la permeso de iu ajn cenzuristo. Tio estu mia nepra libero. Mi ne vivis 85 jarojn en respubliko por nun ĝin rezigni.

#### Valo

\*\*\*\*\*

(El "Anekdotoj pri Gabrovanoj")

*Pri la Gabrovanoj oni rakontas, ke...*

... nokte ili haltigas la horloĝojn, por ke ili ne eluziĝu vane.  
... ili tranĉas la vostojn de la katoj, por ke tiuj pli rapide pasu tra la malfermitaj pordoj vintre kaj la varmo ne eliru rapide el la ĉambroj.

... ili surmetas verdajn okulvitrojn al la ĉevaloj, por ke tiuj pensu, ke la rabotaĵo, metita en la trogo, estas fojno kaj manĝu ĝin.

... ili dancas rondodancon piedvestitaj en ŝtofpantofloj por aŭdi la muzikon en la najbara urbo Sevlievo.

## ANALIZA GRAMATIKO (4)

\*\*\*\*\*

### Kondicionalo

Oni povas diri ke estas plena akordo inter la esperantistoj pri tio, ke estas plej bele uzi laŭeble nur la verbajn formojn simplajn ; sed tia uzo en la kondicionalo, kvankam plaĉa al niaj okuloj, ŝokas nin, ĉar ĝi kolizias kun la formoj ne logikaj uzataj en la okcidenteŭropaj lingvoj kaj kun la dinamika forto de niaj kutimoj, kiu pelas nin uzi formojn kompleksajn. Pro tio al multaj ŝajnas ĝustaj, eĉ logikaj, frazoj eraraj kiel la jenaj :

1. Se ĉi-matene, kiam mi eniris en la klasoĉambron, mi estus sciinta, ke vi ne troviĝis en ĝi, mi ne estus enirinta en ĝin.
2. Se ĉi-matene, kiam mi eniris, mi estus sciinta, ke vi ne estis veninta, mi ne estus lasinta vian libron sur la tablo.
3. Se ĉi-matene, kiam mi eniris, mi estus sciinta, ke vi ne venos (aŭ ke vi ne estis venonta), mi ne estus lasinta vian libron sur la tablo.

Kara leganto, se al vi ŝajnas, ke mi eraras kaj ke ĉi tiuj frazoj estas ĝustaj, kvietiĝu, ne ekkoleru, kredis ke Zamenhof neniam uzus tiajn, kaj klopodu sekvi mian rezonadon. La participoj ĉiam esprimas tempon relativan al la tempo de la helpa verbo "esti", t.e., tempon preteritan, prezencan aŭ futuran rilate al tiu tempo, pri kiu oni parolas. Nu, en la tri ekzemploj ni parolas pri la momento de mia eniro, en la mateno, kaj ni parolas pri mia scio en tiu momento, ne en antaŭa aŭ posta, kaj pri tio, kion mi ne farus en tiu sama momento.

En la modo indikativo ni dirus : "Kiam mi eniris, mi ne sciis, ke vi ne troviĝis tie (aŭ ke vi ne estis veninta aŭ venonta), kaj tial mi ne eniris (aŭ ne lasis la libron)", kaj la ŝanĝo de modo ne ŝanĝas la tempan rilaton.

Vi devas konsideri nur, ke, kvankam kondicionalo ne esprimas per si mem tempon, ĝi ĉiam signifas "en la tempo pri kiu oni parolas", ĉi-kaze, "kiam mi eniris matene". Sekve, "se kiam mi eniris mi sciis...", kaj ne "se mi sciis antaŭe aŭ poste, aŭ se mi estus sciinta aŭ scionta". Ĉar rilate al la tempoj ne gravas la signifo de la verboj, ni ŝanĝu la verbon "scii" per "morti", kaj ni havos "Se kiam mi eniris, mi estus mortinta = Kiam mi eniris mi estis mortinta", kio povus okazi nur mirakle, ĉar eniranto povas morti, sed

mortinto ne povas eniri. Se vi ŝatas iom cerbumi, tio pli klare vidigos al vi la diferencon kun la formo simpla:

Ĝustaj, la frazoj estas jene :

1. Se ĉi-matene, kiam mi eniris en la klasoĉambron, mi scius, ke vi ne troviĝis en ĝi, mi ne enirus en ĝin.
2. Se ĉi-matene, kiam mi eniris, mi scius, ke vi ne estis veninta, mi ne lasus vian libron sur la tablo.
3. Se ĉi-matene, kiam mi eniris, mi scius, ke vi ne venos (aŭ ke vi ne estis venonta), mi ne lasus vian libron sur la tablo.

La reguloj estas simplaj :

1. En la modo kondicionalo uzu formon kompleksan, nur kiam vi mem uzas tian en simila frazo en la modo indikativo.
2. La uzo de kondicionalo devas esti ĉiam simetrie identa en la preterito kiel en la futuro.

Ekzemploj :

Se morgaŭ (aŭ hieraŭ) mi havus tempon, mi legus tiun ĉi libron -- Se morgaŭ (aŭ hieraŭ) li estus mortinta, li ne povus denunci vin, nek estus ĝenonta vin plu -- Se kiam mi eniris (aŭ eniros) la lernejon, mi estus sciinta kaj forgesinta la lecionon, tio neniom estus utila.

3. Por bone uzi la kompleksajn verbajn formojn en iu ajn modo, nepre memoru, ke tempa adverbo aŭ adjekto situanta antaŭ la helpa verbo esprimas la tempon, pri kiu oni parolas, sed se ĝi situas post la participo, ĝi esprimas la tempon de la ago, pro kio la situo de la adverbo ŝanĝas la signifon de la frazo.

Ekzemploj :

"Je la 4a oni estis vundinta lin" signifas, ke la vundo okazis antaŭ la 4a, *en* ne precizigata momento, sed per "Oni estis vundinta lin je la 4a", oni precizigas, ke la vundo okazis ĝuste je la 4a.

Same la tempo de la fermo estas malsama, se oni diras "Se la vendredon oni jam estus ferminta la butikon", ĉar oni povas supozi, ke oni fermis ĝin la ĵaŭdon aŭ antaŭe, ol se oni diras "Se oni jam estus ferminta la butikon la vendredon", tial ke ĉi-kaze la tempo de la fermo estas evidente la vendredo.

L. Mimó

Nia novelo :

Ĝiz el Lamark

## LA TUROJ DE BABELO

*Estas kompreneble, ke li deziras havi nenion komunan kun nia afero, kiun li nomas "malpura virina komploto". La plimulto el la viruĉoj voĉdonis kontraŭ, kiam oni pribalotis la proponon, kaj krome lia artista sentemeco ŝajnigas ĝin ankoraŭ pli abomeninda.*

*Sed lia sinteno jam devigis Panjon kaj min diskuti la farotaĵon nur virinslange dum la tuta vojaĝo, kio estis sufiĉe embarasa. Kaj kiam fine ni atingis ĉi tien, li ne helpis nin malŝarĝi la delikategan pasi-ricevilon, la komputoron kaj la pezan energiret-generatoron, sed pretekstante la belegan perspektivon, kiun oni povas ĝui sur tiu tumulo (for de niaj maŝinoj) kaj la neceson tuj komenci la pentradon por uzi kion nur eble la naturan taglumon, li kunprenis siajn ilojn kaj lasis nin solaj tuj post la alteriĝo.*

*Jen li estas, izolita kolormakulo sur la fono de malhelaj, nedifineblaj disfaltaĵoj. Sed, malantaŭe, ĉielen leviĝas la turoj. El iuj restas nur metalframoj, aliaj pli-malpli difektitaj, staras tamen malhumile kiel antikvaj defendistoj montrantaj la signojn de l' batalo sur la kruele batitaj kirasoj.*

*Ĉu la vegetaĵoj penetris ankaŭ en ilin, kaj nun la vivo ankoraŭ kaŝiĝas interne ? La ruinoj ĉirkaŭ ni estas dense loĝataj, atestas nia aŭdsento sed ne nia vidado.*

*Post nia alteriĝo, ni malŝarĝis kaj konektis la aparatojn dum ĉirkaŭe regis morta silento. La (niaespere malgrandaj) loĝantoj kaŝe observis la fremdegan aspekton de ni kaj niaj maŝinoj, kaj la subite minacan ekbrilon de nia energi-reto fine ŝaltata por protekti nian kampejon.*

*Ŝajne, nia evidenta absorbiĝo en la ekfunkciigo de la pasi-ricevilo pruvis al ili, ke ni ne intencas minaci ilian sekurecon, do pli kaj pli senĝene ili komencis vibrigi la aeron per siaj kutimaj triloj, kantoj kaj alvokoj.*

*Mi lace kuŝas sub la protekto de l' energireto, rigardas la forajn turojn, aŭskultas la voĉojn de l' naturo kaj frande suĉas bongustegan bieron antaŭmilitan. Panjo diris al mi, ke ŝi povas nun fari mem ĉion necesan, do mi ripozu trankvile.*

*Nenion alian mi povus fari, mi ne konas la defendistan slangon, per kiu oni donas ordonojn al tiu komputoro kaj mi ne volas ĝin koni. Bedaŭrinde mi ne povas ne aŭdi ŝiajn sekajn ordonvortojn kaj mi divenas la esencon, se ne la ĝustan*

sencon. Mia korpo, ja, povas ripozi, sed kiel povus la animo, apud tiuj inferaj maŝinoj ?

Ili sučas la malamon, kiu brulegis la ruinojn ĉirkaŭ ni, sučas ĝin el la pasinteco, kvazaŭ ĝi estus mielaĵo rafinita kaj ĝin zorge deponas en la komputorajn memorĉelojn. Ruĝa, brulanta malamo, kiu nun briligas kiel okulon la spektrogramon de l' pasi-ricevilo.

Panjo sukcesis izoli la pasi-ondon plej taŭgan por nia celo kaj nia hasto. Se ekzistas alia loko, kie malamo iam fontis pli abunde, klare kaj konstante, ni ne havas tempon por ĝin serĉi. Ni estu kontentaj, ke ni trovis ĉi tiun. La aero ŝajnas premsufoka.

Eble ankaŭ li dezirus bieron, li pentras seninterrompe de kvar horoj. Mi ĉi tie ne povas helpi, do mi perfidas nenion, dume lasante la kampejon kaj irante alporti ion suĉeban al nia puranima pentristo.

Oonaron'stee kaptas la bierbotelon per libera mano, danke klinas la kapon kaj eksuĉas. Ne havante multan tempon por fini la pentraĵon, li ne permesas al si ian distriĝon. Sed, restante for de ni kaj nia energi-reto, li tenis paralizilon preta kaj tuj atingebla. Li pli alte taksas la prudenton, ol la ŝajnige viruĉan multimemon.

Mi ekprenas la armilon kaj garde staras apud li, spertante konsolan senton de utileco. Nun li povas pentri pli absorbite, pli rapide. Liaj penikoj flugas sur la tolo, malkaŝante iom post iom al miaj okuloj la aspekton de l' urbo dum ĝia pompa juneco, kiam ĉiu turo paradis per alteco kaj brilkoloro.

Mia Oon'ĉjo plej amas pentre revivigi la forpasintaĵojn, kaj nia "malpura" misio sur la malpermesita planedo donis al li ŝancon, al kiu eĉ liaj principoj devis iom kliniĝi.

Dumvojaĝe ni ofte diskutis pri la teluranoj\* kaj ilia malfelika sorto ; laŭ mi, ili sin detruis reciproke, ĉar ilia lingvo kaj kulturo tro flegis la individuismen, kiel ĉe la mentt'landoj\*, eĉ ne konantaj la pronomon "ni" kaj obeantaj nur perforte. Oonaron'stee kontraŭe opinias, ke ili ne havis unuecan kulturon, eble eĉ ne lingvon, kiel niaj prauloj en la malluma epoko antaŭ la komuna erao.

Laŭ li, la brilkoloraj turoj nun de li pentrataj enkorpigas la plej vivan deziron de l' diversaj grupoj konkure loĝantaj en ĉi urbo kiel sur la tuta mondo : fariĝi pli potencaj, leviĝi super ĉiuj konkurantoj, altiri respektplenajn rigardojn de ĉiu preterpasanto.

----- \* Te(lu)ro : tria planedo de la suno Helio, ĉe la rando de l' Galaksio (pozicio ne registrita) ---- \* Ment't'lo : grava konfederacio el kvin sunsistemoj en la Kvadrantoj AA3Z kaj AA4A, antaŭ tri jarmiloj ; la restaĵoj de l'loĝantaro de la diversaj planedoj estas ankoraŭ nun nomataj ment't'landoj.

Panjo ne rekte eldiris sian opinion pri la argumento, sed citis la malnovan popoldiron "Al ĉiu pere de l' Kosma patrino, malsama kaĉo, malsama destino" kaj komentis ĝin per ekzemploj trafaj sed ne rilataj al la demando.

Sed kiajn principojn entenis la lingvo, kiu nutris kaj muldis la tenerajn mensojn de l' homidoj en la brila epoko de ilia specio ? Certe ne principojn pri amo, komprenemo, konkordo intergenta. Ili ne kulpis, se Dio ne inspiris al ili la ideon, igi sian lingvon ilo ĉiam pli perfekta por mense kaj morale plibonigi la specion. Ili restis ĉiam supraĵe kultur-itaj sovaĝuloj, nur ŝajne civilizitaj. Aŭ Dio sugestis ja la ĝustan vojon, sed ili kiel infanoj tro okupitaj per siaj ludoj preteratentis ŝian voĉon, ĝis fariĝis tro malfrue...

En la misedukitaj mensoj ekflamis brulego de malkonfido, miskompreno kaj malamo inter diversaj gentoj. En ĉi tiu riĉa havenurbo loĝadis pluraj triboj, kaj ankaŭ inter ili eksplodis buĉfrenezo.

Sed kio sukcesis ĉi tie fariĝis nur akademia demando. Vesperiga. Ruĝaj vagflamoj brulas sur la spektrogramo. Panjo signalas, ke la ŝargo estas preskaŭ kompleta, mankas malpli ol unu horo.

Mi leviĝas kaj fikse rigardas la spektrogramon de proksime. Oni devas jam alfronti la nunan realon. La Asklaro neniam komprenos, ke ni ne volas esti ĝiaj malamikoj. Ĝia saĝa, sed izoligema kolektiva menso certe sukcesos ekstermi ĉiajn eble-konkurantajn fremdestulojn (inter kiuj bedaŭrinde estas nia popolo), se oni ĝin ne haltigos. Kaj ni estas tro malfortaj kontraŭ ĝiaj mirindaj batalŝipoj agantaj rapide kaj senhezite kvazaŭ la ŝipoj mem estus, kune kun la ŝipanaroj, partoj de bone funkcia organismo.

La pulsantaj ekbriloj malamruĝaj milfoje reflektiĝas en miaj okuloj, en mia laca menso. Ŝajnas al mi vidi tra ruĝa nebulo la teruran agonion de l' Asklaro, venenata per rafinita malkonkordo kaj malamo laŭ ĝia telepatia ondo : la detruigo de ĉia veturilo de ĝi stirata, la kolizioj de ĝiaj individuoj-partoj kontraŭ la muroj kaj la kolonoj, la vagado de la jam senmensaj patrinoj for de la senhelpaj etuloj al ili konfuditaj.

Ili ne povos kontraŭstari niajn defendistojn, kiam tiuj enrompos en la vartejojn kaj forprenos kiel eble plej multajn idojn por ilin transporti kosmoŝipe sur nian planedon. Tie jam pretas por ili taŭgaj vartejoj kaj patrinoj zorge instruitaj por doni al la asklidoj la "amon, kaĉon kaj lingvon" necesajn por fari el ili sociemajn individuojn.

Estos por nia planedo grava ŝarĝo, patrini tiom da senhelpuloj ; se ĉiu el ni havus **du** kapojn kaj **ok** brakojn, eble ankoraŭ ne sufiĉus. Eble ni estos devigitaj lasi multajn ovojn niajn nefekunditaj, sed ni ja sukcesos eduki la asklajn larvetojn en sanajn gejunulojn, kiuj eksvarmos **frate** kun niaj idoj en la helverda ĉielo de nia mondo, finfine **paca**.

\*\*\*\*\*

**KRUCVORTENIGMO** de P. Signoret (r = nur la radiko!)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

**Horizontale** : 1. Kiel ekzemple Zamenhof (r). 2. Helruĝe lumineska. 3. Dio aŭ planedo. Kemia vortero. 4. En ia loko. Utilaĵo. 5. Junulinoj. 6. Koncepta. Ĉiela loĝanto (r). 7. Bildstria heroo (sed... li forgesis la ĉapelon!) (r). Teksaĵo. 8. Ronĝi. Nedifina. 9. Participa finaĵo. Poemo (r). Artikolo. 10. Forigo de meza intestoparto (r).

**Vertikale** : 1. Ankaŭ al Zamenhof ili donis klaran vidon. 2. Agi (r). Stulte. 3. Tiaj ke oni ne devas ilin ĉirkaŭiri. 4. Foroferi (r). 5. Surogato de posedo. Parto (r). 6. Fonetike : pagilo. Persona. Naskito. 7. Alveninta. 8. Suĉmedikamento. Telefonavoko. 9. Prepozicio. Voknomo (r). Korinklino (r) Karburoleoj.

**Solvo de la krucvortoenigmo aperinta en L! 58 :**

- Hor** : 1. GELAŬTULOJ. 2. UPU. INULO. 3. VOLAPUKO. 4. EKIRI. TNT. 5. RF. TAHITIO. 6. NANINO. OBL. 7. IRIGANT. EE. 8. SANE. ORERO. 9. TN. BAROKAN. 10. ITALDEVENA. 11. NAŬAJ. OP.
- Ver**. 1. GVERNISTIN. 2. EPOK FARANTA. 3. LULI. NIN. AU. 4. APARTIGEBLA. 5. PIANA. ADJ. 6. TIU. HONORE. 7. UNKTI. TROVI. 8. LUONTO. EKE. 9. OL. TIBERANO. 10. JOD. OLEONAP.

\*\*\*\*\*


**NASRUDIN**

*Nasrudin kuŝis sub morus-arbo dum varma somer-tago, rigardante grandajn akvomelonojn, kiuj kreskis apude.*

*"Kial, li scivolis, granda arbo naskas etajn fruktojn, dum malforta grimplanto naskas grandajn, bongustajn melonojn?"*

*Dum li scivolis, moruso falis sur lian kalvan kapon.*

*"Do jen la kialo ! Kial mi ne pensis pri tio antaŭe?"*



**VANA LUDO PRI LANDNOMOJ**

S-ro Maul, la redaktoro de **Monato**, en numero 10/83 (pĝ.26) proponas, ke legantoj partoprenu en ludo : ili voĉdone esprimu siajn preferojn por diversaj formoj de landnomoj en listo de 50 eroj. Konkuras nomformoj en verko de André Albault kontraŭ tiuj uzataj en **Monato** kaj **La Jaro**. Mia vidpunkto estas, ke la voĉdona metodo tute ne konvenas por solvi lingvajn demandojn. Ĝi estas ĉiam destinita al fiasko, ĝuste ĉar la rezultoj de la voĉdonado estas devigaj por neniu. Antaŭ kelkaj jaroj voĉdonado estis organizita por decidi pri la ĝusta nomo de grava moderna aparato : ĉu ĝi estas komputilo, komputoro aŭ komputero ? Ankaŭ aliaj malofte uzataj vortformoj rolis en tiu enketo. Post la voĉdonado la kaoso restis same kiel antaŭe. Kelkaj esperantistoj uzas "komputilo", aliaj "komputoro" kaj tria grupo preferas "komputero". Tiu voĉdonado ja havis negativan efikon, ĉar ĝi estigis amaran polemikadon inter kelkaj el la partoprenintoj.

Kiu aŭ kio, do, povas decidi aŭ kapablas solvi problemojn de nomenklature en Esperanto ? Miaopinie, nur la daŭra uzado de Esperanto en diversspecaj skribaj kaj parolaj kunteksto fare de homoj kun bona scio de la Internacia Lingvo montras, kiuj vortoj kaj nomoj estos vivipovaj. Dume, estas vane provi rapidigi tiun procezon per kvazaŭ devigaj rimedoj. S-ro Maul skribis, ke eble "ni devos atendi ankoraŭ jarcentojn, por havi decidon akceptotan de ĉiuj." Tio estas enorma malstroigo. Eĉ jarmiloj ne sufiĉus por atingi unaniman akordon. Nuntempe, post preskaŭ jarcento da diskutado pri landnomoj, la solvo ne estas pli proksima ol ĝi estis en la fruaj jaroj de Esperanto. Male, ŝajnas, ke oni kelkfoje iras unu paŝon antaŭen kaj du malantaŭen. Mi pensas pri proponoj anstataŭigi per novaj formoj landnomojn jam uzatajn kaj akceptitajn de esperantistoj dum jardekoj, ĉar tiuj ĉi ne konformas al principoj formulitaj de reformemuloj. Ekzemple, A. Albault volas uzi "Argentino", "Danmarko" kaj "Polonio" anstataŭ la tradiciaj formoj "Argentino", "Danlando" kaj "Pollando". Kiom da konfuzo estos kirlita en Esperantujo pro la entrudo de tiuj konkurantaj landnomoj ! Kiu uzos ilin krom Albault ?



Li argumentas, ke ili estas pli internaciaj, ĉar ili pli similas al la nomoj de tiuj landoj en vasta nombro de etnolingvoj. Nu, kio ? Li volas forigi "Pollando" kaj "Danlando" sed proponas "Laŭlando" !

Ni pritraktu pli detale lian esperantigon de Ghana per la formo "Ganeo", kiu estas pura elpenaĵo. La lando estas nomata "Gano" en **Poŝatlaso de la Mondo** (PAM), kaj **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV) registras "Ganao". En tiu ĉi kazo estas relative facile trovi racian solvon per la principo de analogio. Ĉi-sube estas listo de similformaj landnomoj ; en kolumno A troviĝas la etnolingvaj formoj, kaj en kolumno B estas la jam akceptitaj Esperantaj formoj. En kolumnoj C kaj D temas pri landnomoj ankoraŭ ne unuforme registritaj en Esperantaj konsultlibroj.

A	B	C	D
<u>Canada</u>	Kanad/o	<u>Grenada</u>	Grenad/o
<u>Cuba</u>	Kub/o	<u>Tonga</u>	Tong/o
<u>Kenya</u>	Kenj/o	<u>Ghana</u>	Gan/o

Surbaze de la principo de analogio, estas eble starigi la sekvan regulon : se la etnolingva nomo finiĝas per konsonanto + a, la nomo en Esperanto finiĝas per la sama konsonanto (aŭ ĝia ekvivalento en la Esperanta alfabeto) + "o". Cetere, la formo "Gano" estas preferinda al "Ganao" aŭ "Ganeo", ĉar ĝiaj pluformitaj formoj, "gana" kaj "ganano" estas pli belsonaj ol la respondaj vortoj bazitaj sur "Ganao" aŭ "Ganeo": "ganaa", "ganaano" kaj "ganea", "ganeano".

Alia principo, uzata ankaŭ en etnolingvoj, estas laŭmorfema traduko de landnomoj. Ekzemple, la lando nomata en la franca lingvo Côte d'Ivoire havas jenajn ekvivalentojn : Ivory Coast (angla), Elfenbeinkuste (germana), Bereg Slonovojj Kosti (rusa) kaj Elefántcsontpart (hungara). En Esperanto ĝi devas esti "Ebura Bordo". En PAM troviĝas la nomo "Eburbordo", sed en PIV estas registrita la kreita formo "Eburio", kaj Albault fantaziis "Ivorio" ! Tiu ĉi formo estas nek internacia nek komprenebla por esperantistoj, kiuj, tradukinte "Eburbordo" en sian propran lingvon, povas kompreni pri kio temas.

Tute kaosa en la voĉdona listo de s-ro Maul estas la traktado de hagonimoj, t.e. loknomoj portantaj la nomon de sanktul(in)o. La proponoj de Albault estas karakterizitaj per nekonsekvenco. La du anglaj nomoj Saint Lucia kaj Saint Vincent estas esperantigitaj kiel "Sent-Lucio" kaj "Sen-Vincento" respektive. La unua demando estas, kial Albault

transskribis la anglan vorton saint jen per "Sent", jen per "Sen" ; la ĝusta prononco estas "sejnt". Ĉar Albault ne tradukas ĝin en Esperanton, kiel faras **La Jaro** (Sankta Lucio, Sankta Vincento), ĝi havas malsaman formon en loknomoj venantaj el aliaj lingvoj. La portugala nomo São Tomé, signifanta "Sankta Tomaso", estas "Sao-Tomeo" laŭ Albault kaj "Saotomo" laŭ **La Jaro**. La Respubliko San Marino havas jenajn konkurantajn formojn en Esperanto : (1) San Marino (neasimilita), (2) San-Marino, (3) SanMarino. Mankas nur "Sanmarino", la sola ĝusta formo. "San-Marino" ne estas komparebla kun "Sud-Afriko" kaj "Nov-Jorko", ĉar "San-" ne estas Esperanta morfemo kun la signifo "sankta", dum "sud-" kaj "nov-" havas signifojn en Esperanto. Pro tio oni devas skribi la landnomon per unu vorto, "Sanmarino", same kiel "Kostariko", "Srilanko", "Sieraleono" kaj aliaj similaj dupartaj loknomoj.

Fine, por ne eviti la tiklan demandon formantan la titolon de la artikolo de s-ro Maul - "Zimbabvo aŭ Zimbabveo?" - mi provos respondi ĝin per apliko de la principo de vortestetiko. La diablo prenu ambaŭ cititajn formojn, "Zimbabveo" kun la fremda litero w kaj "Zimbabvo" kun la orelagaca konsonant-grupiĝo "bv", kiu memorigas min pri la bleko de seksardanta afrika bubalo. Mi voĉdonas por "Zimbabŭo"!

**Bernard Golden.**

### Mallonge pri "KVADRATIGO DE CIRKLO"

Ke mia "kvadrato de cirklo" (L! 56) aperis ne aliloke sed en "ĉies voĉo", elvokis nenecesan reagon (Bof! (2), L! 57). Mi ne intencis aliĝi al replikoj pri "kvadrato", sed celis informi al ĉiuj (escepte de unu) L!-legantoj ties "matematikan" superrigardon.

Pri B.G.D., nu.. li ne estas la sola, kiu ĝenas fakulojn per solvo de nesolveblaj problemoj (ĉu paranoje, ĉu miskompreno, ĉu alicelo), kaj kiun matematikistoj rezignas kuraci kaj kutimas ignori.

-- Jamo --

### CIRKLOKVADRATURO : Kiu pravas ? Formulado.

K-do Valo prave diras en lasta "Laŭte", ke la matematikistoj kaj la "kvadraturistoj" parolas pri du malsamaj aferoj rilate la cirklokvadraturon. Efektive, la "kvadraturistoj" parolas pri konkreta cirklo, strekita per cirkliĵo, helpe de kiu ili celas streki samarean kvadraton, dum la matematikistoj abstrakte teoriumas pri neekzistebleco de absolute perfekta cirklo konsistanta el multnombraj poligonoj,

se mi bone komprenis. Konsekvence, eblas konstati nur, ke la matematikistaj rezonoj ne rilatas al la problemo pri la cirklokvadrato, kaj ke tial la matematikistoj ne rajtas konkludi pri la nesolvebleco de tiu problemo en praktiko, kvankam ili tion faras jam de jarmiloj.

Do la problemo restas solvota. Tion ja pruvas la konkludo mem de k-do Valo : "Ĉiu (koncepto) restu sur sia firma pozicio", fonto mem de ĉiu dogmiĝo kaj disiĝo.

Kvankam SAT-ano, mi volonte konsentus kun tiu konkludo, kondiĉe, ke la "laŭte"-legantaro jam sciis pri la J. Ŝtrumfa procedo, sed tiel ne estas. J. Ŝtrumfo ankoraŭ ne prezentis ĝin, kaj tiel K-do Valo ne povas prave finkonkludi. Nur la matematikista koncepto estis prezentita. Nun decas, ke la "obstina kvadraturisto" prezentu la sian. Nur tiel eblas al la "Laŭte"-legantaro ĝuste mem kompari kaj mem konkludi pri tiu problemo. Tial mi prezentas hodiaŭ la formulon per kiu J. Ŝ. resumas sian procedon por efektiviĝi la cirklokvadraturon. Jen ĝi :

"La latero de kvadrato, kies areo ekvivalentas tiun de cirklo C1, estas la diametro de cirklo C2, strekota precize meze inter la cirklo C1 kaj alia cirklo C3, kies radiuso estas unu segmento de la oklatero strekebla en la cirklo C1". Komprenible estas subkomprenata la strekado antaŭa de necesaj perpendikloj kaj diagonaloj.

Mi tuj aldonas, ke tiu formulo ne indikas la plej simplan kaj precizan manieron procedi : ĝi ja estas nur memorilo. Tiun manieron mi demonstros en sekvonta "Laŭte", pro la eblaj rebatontoj jam pretaj elarkivigi nekonatajn famulojn kaj teoriojn. Tiujn eblajn rebatontojn mi nur petas, ke ili bonvolu doni precizajn klarigojn pri la apartaj roloj de la cirkloj C2 kaj C3, kaj ankaŭ precizigi kial la radiuso de la cirklo C3 nepre estas unu segmento de la oklatero enstrek-ebla en la cirklo C1.

Sen tiuj klarigoj, mi opinios ĉiun rebaton fantazia kaj ne respondinda.

Ek al viaj rektiloj kaj cirkliloj !

**Anonima B.G.D. )Eymet(**

**Letero de nereaboninto** : "Mi petas vin noti, ke mi ne reabonas Laŭte'n pro diversaj kialoj, inter ili jen :

Mi estas maljuna, kaj malmulte entuziasmiĝas.

Mi ne ŝatas la diskutadojn kaj la harfendadojn.

Tamen mi konsentas diri, ke via bulteno estas kelkfoje interesa."

**Red. rimarko** : Efektive, temas ne pri "mia" bulteno, sed pri "Laŭte!", kiu konsistas el tio sendata de la abonantaro. Sed tiu leginto fakte neniam sendis propran kontribuon. Ĉu viktimo de la kvadrato ???

## Anglalingvano faras respondon al amiko J. Deker, pri la angla lingvo.

Ne estas ege malfacila tasko trovi anglalingvanon, kiu scipovas la internacian lingvon ; ili ja ekzistas, kaj ja abonas al Laŭte! Verŝajne estus pli malfacila afero trovi tian homon, kiu tamen konservas la opinion, ke la angla iel povus superi Esperanton kiel lingvo internacia.

Ne ĉiuj anglalingvanoj, kompreneble, tenas veran opinion pri la demando. Ekde junaĝo mi kaj multaj aliaj anglalingvanoj ricevis la necesan trejnadon en la arto, kii ĉiam pli kaj pli laŭte al fremduloj, kiuj ne komprenas nian lingvon, ĉar ĉiuj scias, ĉu ne? ke se ni krias sufiĉe laŭte ĉiu komprenas nin !

Feliĉe por mi mem, mi trovis la internacian lingvon ; por mi la afero tute ŝanĝiĝis. Sed multaj miloj da aliaj anglalingvanoj neniam plu pensas pri la afero ; ili simple tenas la opinion, ke alilingvanoj estas, laŭdifine, stultuloj, ĉar ili ne komprenas la anglan lingvon.

Estas fakto, tamen, ke la sinteno de la brita registaro restas, ke la angla ja indas esti la internacia lingvo ; niaj argumentoj pri la supereco de Esperanto en tiu kampo trovas nur surdajn orelojn, kvankam ni eble rajtas eltiri konsolon el la fakto, ke tiu brita registaro ja pretas, foje, ebligi al parlamentano starigi la demandon kaj al ĝi aŭdi respondon. Por la usona registaro, la demando pri internacia lingvo simple ne ekzistas ; la lingvo sur la dolara monbileto estas la lingvo, kiu aĉetas ion ajn ie ajn, ĉu ne?

Mi verkas tiujn ĉi liniojn, do, ne ĉar mi volas defendi la anglan lingvon. Efektive, grande ĝenas al mi aŭdi la malbelajn sonojn, kiuj rezultas el la (kutimaj) provoj de alilingvanoj uzi la lingvon de miaj gepatroj. Jes, la angla lingvo estas malfacila lingvo ! La prononcreguloj estas idiotaj kaj varias de loko al loko ; ankaŭ tion mi akceptas. Sed, tamen, al anglaj oreloj la elparoloj de la geaktoroj sur la scenejo de Stratford-on-Avon, (strtf'd sur rivero ejv'n), viciĝas inter la plej ŝatataj sonoj en la mondo.

Se ni povus almenaŭ limigi la uzadon de la angla lingvo inter la bordoj de la brita insularo -- kaj la uzadon de la usona lingvo al la kvindek ŝtatoj en Nord-Ameriko -- kaj tiel plu ! Sed ho, ve ! tio ne eblas.

Esperantistoj devas ne perdi esperon, tamen. La ĉinoj ankoraŭ ne grandamase lernas nian lingvon, sed la ritmo de disvastigo en tiu lando pli kaj pli rapidiĝas, kaj sufiĉe baldaŭ

mi estas konvinkita, la cetera mondo sekvos la instigon de la ĉinoj. Ni ne laciĝu en niaj preparlaboroj ; alfabetigo de kvincent milionoj da homoj pere de la internacia lingvo postulos ĉiujn niajn komunajn strebojn. La lingvo estas preta por la tasko ; ankaŭ ni devas esti pretaj. Ĉefe, ni devas komune voli la celon de akcepto de nia lingvo.

Intertempe, ni povas kviete konstati, ke la provo disvastigi la kripligitan anglan lingvon, kiun oni nomis : "Basic English" (bejsik engliš), mortis antaŭ pluraj jaroj. Ĝi restas en nia memoro nun nur kiel ekzemplo de la erara pensmaniero supozi, ke nur la esencaj, bazaj elementoj el iu ajn lingvo sufiĉus por ebligi interkomunikadon. Estas nun nur afero de historio, ke tiuj, kiuj lernis tiun bazan anglan tuj trovis, je ekuzo, ke ĝi ebligis komprenon en nur unu direkto, tio estas, ke tiuj, kies gepatra lingvo estis la (ordinara) angla komprenis la alian, sed ne inverse. Ne necesis multa tempo kompreni, ke la instigo lerni tiun bazan lingvon estis bon-intencita trompo, ĉar nur per ellerno de pli-malpli la tuta lingvo estas interkomprenado ebligita. Se iu studanto volas serioze studi la fenomenon sub la nomo 'Basic English', tiu verŝajne trovos librojn pri ĝi en universitataj bibliotekoj, aŭ en similaj lokoj.

Sed la plej taŭga konsilo senhezite estas : studu la sukceson kiu estas Esperanto ; studado de la malsukceso, kiu estis 'Basic English', estus plena perdo de energio.


Roterdamo,  
1985-01-23

LM

"BASIC ENGLISH" : - La aŭtoro OGDEN estis fakulo de la ĉina lingvo kaj instruisto de la angla al la Ĉinoj. La ideo estis faciligi la lernadon de anglaj vortoj aranĝitaj laŭ ĉina maniero, t.e. laŭ-vorta traduko. Por tiuj, kiuj ne havas ĉinan pensmanieron, ĝi ne estas pli facila ol ordinara angla ! ... kaj tute senutila kaj ne taŭga, malgraŭ iom da propagando kaj provoj. Alia ideo de OGDEN estis la sama sistemo kun la latina... nenia sukceso malgraŭ pli facila prononco kaj pli internaciaj radikoj... La nura malfacilaĵo de la latina estas ja la gramatiko sed la interesata publiko estas malpli mult-nombra ol tiu de la angla... en Ĉinio !

P.M.G.

La ĉi-sekva desegno fontas el la franclingva revuo "Pourquoi?" (Kial?) n-ro 170 de decembro 1981. Ĝi rilatas kun neniu el la temoj pritraktitaj en tiu ĉi numero, sed ĝi estas tiel bela ....



FRANCISKO LA UNUA dekretis la devigan uzon de la franca lingvo en oficialaj aktoj ne por malvigligi la regionajn lingvojn kaj centralizaj celoj, sed kontraŭ la latina lingvo. Li opiniis tiun lingvon italianaĵo kaj li tre ege malamis Italojn, ŝaluzis kontraŭ ili kaj deziris eksciti la francan nacismon kontraŭ ili. La kleraj aliregionaj Francoj ne pli bone interkomunikis per la pariza ol per la latina, sed ili certe malpli bone komunikis kun aliaj Eŭropanoj, kaj tio plu daŭras ankoraŭ hodiaŭ ! Esperanto estas tre malproksime egali la disvastiĝon kaj uzadon de la latina antaŭ Francisko la 1a !  
P.M.G.

## La angla, lingvo internacia de aernavigado

La 19an de februaro, en la tagmeza radio-elsendo de France Inter, mi aŭdis : "La alilandaj aviadistoj ne amas alteriĝi en Hispanio, ĉar ili malbone komprenas la anglan lingvon parolatan de hispanaj aerkontrolistoj".

Nu, ne nur hispanoj fuŝe prononcas la anglan lingvon. Ĉiu, ne denaske anglalingva, kiu provis ĝin uzi, scias, ke tiu lingvo estas tiel malfacile aŭdebla kiel prononcebla.

Ĉu iam oni komprenos, ke la angla tute ne taŭgas kiel lingvo internacia ? Ĉu la homoj iam ekscios, ke de antaŭ preskaŭ cent jaroj ekzistas ĝusta solvo al tiu problemo de internacia interkompreno ?

**Valo.**

### PROKSIMUL-TIMO

La terminon "proksimul-timo" mi antaŭ nelonge kompilis por per ĝi projekcii malnovaĵon en transformita formo sur la ĉiam-denove-novan ekranon. Tia ekrano estas la diafane sendikeca limo inter futura kaj pasinta tempoj. Ĉiu, kiu futuren pensadas, povas vidi la bildojn sur tiu ekrano, sed ankaŭ la revulo, erarkredante sin jam en futuro dum, ankoraŭ alkroĉiĝante al pasinto, rigardas la ekranon, tamen vidas la bildon kiel spegulan skribon.

Proksimultimo estas fenomeno, kiu ankoraŭ abunde ekzistas. Ofte oni timas por fari komplezon aŭ doni plezuron al proksimulo ; oni ne faras pro timo, ke oni estus juĝata stulta aŭ malica. Nepetite doni helpon plurfoje estas malĝuste taksata, tiel ke al multiuj estas timo helpi en bezono.

Timo estas morbo ; malsano, kiu kaŭzas katastrofojn. Tamen ĉi malsano ne estas nekuracebla. Proksimultimon ni povas nuligi per ekologia vivado. Ne timu komplezi ! Ne evitu proksimulon, sed helpu malgraŭ ke vi ne konas tiun ĉi.

Troe oni nomas helpon filantropio. Ankaŭ ĝi estas formo de honesta egoismo. Mem oni ĝojas dum oni ĝojigas proksimulon. Esti feliĉa pro la ĝojo de aliulo. Kiam ni sukcesas nuligi proksimultimon en ni, tiam ni estas feliĉaj. Ni ne bezonas fariĝi homamaj ; ni jam estas tiaj. Necesas nur flankenmeti la timon por efektiviĝi komplezojn.

Proksimultimo estas nia malamiko. Tian malamikon oni ne perforte povas nuligi. Per atombomboj oni ne povas venki ĝin, male : la timo pligrandiĝas. Proksimultimo malaperas, kiam sur la tempekrano aperas daŭre pli da homoj, kiuj transformiĝis, kiuj havas alian paradigmon (pensŝablonon) kaj kiuj rezignis pri malamaj sentoj el longe pasintaj periodoj

Kio okazis antaŭ jarmiloj ne plu rolu sur la ĉiam-denove-nova ekrano. Ankaŭ malagrabaĵoj hieraŭaj aŭ el tempo pli pasinta estu kiel eble plej baldaŭ flankenmetataj. La estonteco de ni ĉiuj dependas de etoso, en kiu ne plu ekzistas proksimultimo.

19850110 (4K19)

iea iu

### "The good of the crown"...

Mallongan tempon antaŭ la fino de la dua mondmilito mi sukcesis ripari multajn pecojn de tre bona radioricevilo, kiun mi metis en fenestron de mia butikoj. Trairante, angla oficiro ĝin vidis, alvenis kaj petis, ke mi aŭdigu al li ĉi tiun aparaton. Ĝi funkciis tre bone.

Anstataŭ ĝin pagi, li diris : "That is the good of the Crown", ĝin prenis kaj eliris... sen doni monon aŭ bileton de kvitanco...

Mia protesto ĉe "Claims & hirings" estis sen rezulto, ĉar oni diris al mi : "Via liberiĝo el la germana tiraneco valoras multe pli ol ĉi tio."

-nn-

### ĈAPELOJ

O.E.O. havas nun efikan propagand-centron ankaŭ en "Svedio" (Svedio!). Ĝi havas la samajn taŭgajn argumentojn, eĉ pli bone prezentitajn, kun bildoj kaj trafaj citaĵoj. Sed la proponita solvo restas peza kaj senutile komplika, forigante la "ĉapelojn" per ŝanĝoj arbitraj en ĉapelitaj vortoj kaj enkondukante la mankantajn "qwx" en aliajn vortojn, sennecese...

Urĝas, ke estu oficialigita taŭga helpregulo !

P.M.G.

Ĵansebo :

KIOM ?

Tabua vorto ĉe Esperantistoj. Kiom ni estas ? Kiom da vortoj en la lingvo ? Se oni demandas tion al vi, nepre respondu MALPRECIZE. Malprecizeco estas nia ĉefa atuto.

"Kiom da esperantistoj en la Mondo ?" - plejofte demando de la interesuloj. "Ni estas multnombraj, en la tuta mondo... - Jes, sed kiom precize ?... - Eble kelkaj milionoj... - Ŝajnas multe !... - Almenaŭ tiuj, kiuj aĉetis lernolibron." La interesulo foriras, dubante. La varbanto pensas : "Bona afero, li pensas, ke ni estas almenaŭ 10 milionoj, do certe li aliĝos, por pliampleksigi tiom sukcesan movadon !"

Bedaŭrinde, tiu unuagrada rezonado ne funkcias, almenaŭ lau mia sperto. Mi neniam konstatis, ke tiaj argumentoj alkurigis gelernantojn. Male, ili pensas a) ke ni kaŝas al ili la veron, b) ke E. ne estas serioza afero, c) ke ni blufas ilin. Ili miras, kial oni malpli aŭdas pri Esperanto, ol pri sektoj aŭ sekretaj societoj, kiuj havas malpli da anoj kaj ne emas al propagando.

Kiom da vortoj en la lingvo ? P.V. enhavas 7866 radikojn (mia eldono, 1953). Ni klarigas al publiko, ke Esp-o estas facile lernebla, ĉar dank'al afiksoj kaj vortkunmetadoj oni bezonas lerni dekoble malpli da vortoj ol, ekzemple, en la angla. Mi taksas je 5000 la kvanton da vortoj por sin flue esprimi per la angla. Do 500 esperantaj radikoj devus sufiĉi por sin tiel taŭge esprimi. Nu, iuj pensas, ke baza subaro de Esp-o el 1000 radikoj estus nesufiĉa por atingi la fundamentajn celojn de nia lingvo : egaleco, facileco, neŭtraleco kaj atingebleco de ĉiuj. Se oni flankenmetas 3000 vortojn de P.V., ĉar ili havas "fakan" signon, ĉu ĉiuj devas lerni 5000 radikojn por esti Esperantisto ?

Ambaŭ aferoj estas ligitaj : lau la nombro da vortoj necesaj por "scipovi E-on", tiu da esp-istoj ŝanĝiĝas. Per simpla rezonado oni kalkulas ĝin : Esp-isto estas iu, kiu scipovas E-on. Se E. enhavas 5000 radikojn, estas nur kelkaj centoj da E-istoj en la tuta mondo. Se la deviga radikaro estas 500, la nombro kreskas. Se oni nomas "E-isto" ĉiujn, kiuj komencis la lernadon aŭ kiuj partoprenas al E-istaj aktivecoj, la nombro estas ankoraŭ pli granda.

Mi opinias, ke ni devas forlasi nian sekretecon, kiu estas kvazaŭ cenzuro. Ni eltiras el ĝi neniun profiton, eĉ vidalvide de la publikaj povoj, kiuj havas ja rimedojn por fari enketojn kaj sondadojn, kaj scias, certe pli akurate ol ni mem, nian nombron. Sed kiom ni ja estas ?

Mi ne disponas pri statistikoj, kiuj helpus min kalkuli la aferon. Mi nur aŭdis pri kelkaj ciferoj - eble falsaj, pere de kiuj mi provos taksi. Jen "forko" : la plej alta nombro - venditaj lernolibroj. Mi aŭdis pri 10 milionoj. La plej malalta - anoj de UEA : ĉirkaŭ 6000. Oni povas aldoni la aliajn asociojn, SAT (estas ambaŭanoj), partoprenantojn de kongresoj.. devas esti sume ĉ. 10 000 personoj. Aliflanke, iuj aĉetis librojn nur por vidi, aŭ posedas plurajn, aŭ mortis... Tio malsuprenigas la nombron al ĉ. 3 milionoj. La forko estas do 10 000 - 3 000 000.

Multaj forlasis lernadon iom poste. Aliflanke, ne ĉiuj E-istoj aliĝas al asocio : mi povas denove malfermi forkon ĝis 100 000 - 1 000 000 personoj, kiuj - almenaŭ - balbutas la lingvon. Kiam oni demandas min, mi anoncas la "optimistan" nombron : unu miliono. Sed ĝi estas tute proksimuma.

La legantoj de L! komuniku la informojn en sia posedo, por pli ĝusta taksado. Denove mi vokas al veremo : ne utilas kaŝi nian kapon en la sablo. Tiel ni eĉ ne kapablas scii, ĉu nia movado iras antaŭen aŭ retroen. Eble ĝi ne moviĝas. Estus strange, por movado, ĉu ne ?